

# Biblia Revuo



**Numero 6**  
**1966**

**Redaktoro: Donald Broadribb**  
**Melburno, Aŭstralio**

Ĉi tiu teksto de *Biblia Revuo 6* estis preparita per la optika signo-programo ABBYY FINEREADER EXPRESS laŭ ekzemplero de la originala numero aperinta en 1966

La originalo de *Biblia Revuo 6* en 1966 estis presita en la Filipinoj (same kiel ĉiuj numetroj 1964-1966). Ĉar la presejo ne posedis ĉiujn specialajn signojn necesajn por ĉi tiu numero, pluraj el la originalaj paĝoj nebele aspektis. En ĉi tiu represaĵo, la intencitaj signoj anstataŭas la originale presitajn. Krome, multaj aliaj komposteraroj estas laŭeble korektitaj (“laŭeble” ĉar pro la nepluekzisto de la manuskripto uzita, ne ĉiam evidentas ĉu nekutima vorto estis nur komposteraro, aŭ intencita de la aŭtoro. Kiam estas dubo, la teksto de la kompostaĵo de 1966 estas konservita.)

## Enhavo

La tuta kajero konsistas el unusola artikolo, tre grava verko de George Rust, “Facila Tekstkritiko Pri La Nova Testamento”.

# FACILA TEKSTKRITIKO

## PRI LA

### NOVA TESTAMENTO

de George Rust

§1 **Presarton** oni komencis en proksimume 1453. Krom se vi la Ĉinojn deziras preparoli, presarton aŭtoris ĉe Mainz en Germanujo verŝajne Johano el Gutenberg tiel proksime je la dato, kiam la Turkoj kaptis Konstantinopolon (1453), ke la diferenco ne gravas. La unuan libron presitan oni kutime opinias esti Biblio. Tio estis kompreneble Biblio Latina (la “Vulgata” traduko); ĉar ekster la mezoriento nenian alian Bibliion oni tiam uzis; kaj multe da homoj laŭŝajne opiniis, ke Latine la Bibliion oni origine verkis, kiel ankaŭ ni en Anglujo, antaŭ ol la plej nova traduko aperis, kelkfoje trovis iujn, kiuj supozis, ke S-ta Paŭlo kaj ceteraj verkis la Anglajn vortojn en nia traduko de 1611.

§2 **Manuskriptoj.** Antaŭ 1453 do ekzemplerojn de libroj oni faris mankopiante per plumo. Nu, se vi permane kopias, vi faras erarojn; kaj ĉiu laŭ via manuskripto kopianto imitas la plimulton de viaj eraroj kaj aldonas kelkajn siajn.

§3 Chaucer ekzemple mortis ĉ.1400, kaj neniam vidis siajn *Rakontojn de Canterbury* presitaj. En sia Prologo, linio 179, li diras, ke lia Monaĥo ne opiniis ĉasadon malkonvena por monaĥoj,

Ne that a monk, whan he is recceheles,

Is likned to a fische that is waterles.

(= nek, ke monaĥo estante senprudenta similas fiŝon senakva). Tion ni legas almenaŭ en la sep manuskriptoj plej malnovaj. Sed kelkaj redaktantoj lin presigante preferas unu manuskripton kiu legigas *cloysterles* = senmonaĥeja, kio estus citaĵo el libro de kanona juro. Alia redaktanto kompromisas konjektante, ke eble la vorto, kiun Chaucer efektive

skribis, estis *resetles* (= senŝirma).

§4 Simile en sia *Infero* iv 141 Dante (kiu mortis en 1321) diras, ke en la unua rondo de Infero oni prezentis lin al (inter aliaj)

Tullio, Alino, e Seneca morale

(= Tullius, iu Alinus, kaj la morala Seneca). Tion diras almenaŭ la granda plimulto de la manuskriptoj. Tullius = Cicero; sed kiu estas Alinus? Unu MSo legigas *e Lano*; sed kiu li estas? Tri MSoj legigas *e Livio*, kio estus la historiisto Livius; kaj kelkaj redaktantoj tion presigas plede, ke ankaŭ Cicero kaj Seneca ambaŭ verkis proze. Sed pli multaj redaktantoj sekvas la dek tri MSojn, kiuj legigas *e Lino* = Linus, legenda poeto.

§5 Eĉ **presistoj** en siaj fruaj tagoj malzorgemis; kaj la precizan tekston de Shakespeare (ĉar li lasis al ni neniujn MSojn de siaj teatraĵoj) oni devas kunpecigi laŭ la fruaj presitaj eldonoj de facilanimaj presistoj. Ekzemple, se ni citas Hamleton (1.2.129, sed en la Zamenhofa traduko 1.2.149) diranta

O, that this too, too solid flesh would melt

(= ho ke ĉi tiu tro tro solida karno fandiĝu!), ni sekvas la trian eldonon (duonfolia formato, 1623). La dua eldono (kvaronfolia, 1605) diras *sallied*; kaj tio laŭ kelkaj redaktantoj estas mislego pro la aĉa skribmaniero de Shakespeare anstataŭ *sullied* (= makulita), kio donus tre taŭgan sencon.

§6 Bibliion oni tre zorge presas: memoru, kiele la Angla reĝo Charles 1-a punis la presiston, kiu forgesis la vorton “ne” en Eliro 20:14! Sed mia avo legis sian poŝformatan Bibliion tiel atente, ke en 1840 li listigis kvar malgrandajn preserojn; kaj en 1942 mi trovis kvinan. Kaj eĉ en la *New English Bible* (Angla traduko de 1961) knabo trovis preseraron ĉe Mk9:43.

§7 Kiom temas pri la **Vulgato**, multaj eraroj enrampis en la Latinan tekston, post kiam S-ta Hieronymus faris tiun tradukon c.400pK: unu vaste konata estis en Genezo3:15, kie ŝanĝante unu literon (*ipse* al *ipsa*) iu ŝanĝis “ĝi vundos”

al “ŝi vundos”, kio en multegaj predikoj la venkon super Peko transŝovis de ĝenerale la praidoj de Eva al la Virgulino Mario. En 1546 la Konsilantaro Trentina dekretis, ke neniu Romkatoliko iun alian tradukon Latinan uzu por Di-servoj, predikoj, debatoj, aŭ komentarioj; kaj petis la Papon finjuĝi la malsamojn inter la MSoj presigante tekston oficialan. En 1590 Papo Sixtus 5-a eldonis tion; sed ĝi ricevis tiom da kritikado, ke en 1592 Papo Clemens 8-a presigis eldonon korektitan. La Vulgato Klementa malsamas la Vulgaton Sikst-an ĉe proks. 3000 lokoj, kaj estas de tiu tempo ankoraŭ la oficiala Biblio de la Romkatolikoj. Nur en niaj propraj tagoj ili komencis la laboron ĝin plibonigi.

### La Unuaj Grekaj N.Toj Presitaj

- §8 En 1514 Kardinalo Ximenes laboris en Hispanujo ĉe Alcala (Latine: *Complutum*). Li pretigis bele presitan Novan Testamenton kun la Greka kaj la Vulgata en paralelaj kolonoj; ĉi tiun kompilaĵon oni nomas la **Kompluta**. Sian Grekan tekston li prenis el kelkaj MSoj, iujn el kiuj li pruntericevis el la biblioteko Vatikana. Permeson eldoni la Papo prokrastis ĝis 1520 parte, eble, por certigi, ke la pruntitaj MSoj sekure revenu al Romo.
- §9 Informo pri ĉi tiu prokrasto elrampis; kaj presisto Nederlanda petis la gloran Nederlandan filologon **Erasmus** redakti Grek-Latinan N.Ton sufiĉe rapide por eldoni ĝin, antaŭ ol Ximenes. Mi bedaŭras raporti, ke Erasmon venkis la tento esti la unua; kaj li (kiel li mem konfesas) la libron “elverŝis, pli ĝuste ol redaktis” tiel, ke ĝi aperis en 1516. Li uzis malmultajn MSojn, el Svislando (kie li tiam loĝis), kaj trovis nur unu MSo de la Apokalipso; kaj vidinte, ke al tiu unu MSo mankas ses versoj, li tiom malhonestis, ke li ilin Grekigis laŭ la Vulgato.
- §10 Sed la protesta uragano kontraŭ la Erasma libro alkroĉiĝis precepe al la *comma Johanneum*. Ĉe 1Jn5:7s la Vulgato presita legigas
- Ĉar tri estas la atestantoj [en Ĉielo: la Patro, la

Vorto, kaj la Sankta Spirito; kaj ĉi tiuj tri estas unu.  
Kaj tri estas la atestantoj sur Tero]: la Spirito, kaj la  
akvo, kaj la sango; kaj ĉi tiuj tri estas en unu.

Sed ĉiuj modernaj Bibliojoj (krom tiuj, kiujn oni tradukis laŭ la Vulgato) ne havas la vortojn en miaj krampoj. Laŭ niaj plej bonaj juĝoj la ekstraĵo originis pro glosa.

§11 **Glosa** estis noto en marĝeno: ĝi eble nur tradukis malfacilan vorton, aŭ eble ĝi aldonis kompletan frazon klarigan. Bedaŭrinde kopiistoj kutimis uzi ĉi tiun saman rimedon (t.e. skribi en la marĝeno) ankaŭ por ion aldoni, kion ili erare preterlasis; kaj la posta kopiisto (laŭ ĉi tiu MSo kopiante novan ekzempleron) tre povus dubi pri io en la marĝeno, ĉu li enskribu ĝin (kiel erare mankintan) aŭ lasi ĝin en ia marĝeno (kiel gloson). Mi donos specimenon modernan. Andreo Lang, Skoto, verkante por literatura revuo skribis belan frazon, kiu finiĝis: "...tia manko je historia perspektivo igas la momenton kaŝi la profundan abismon de la Tempo.". La presisto la vorton "abismo" (*abysm*) ne antaŭe renkontinte sendis al li lian presprovaĵon (por kontroli) kun marko dubiga tie. Andreo Lang por pruvi, ke li ne estas la unua uzanto je la vorto, skribis "Shakespeare" en la marĝeno; kaj konsterniĝis, kiam la revuo disdoniĝis, vidante, ke la frazo jam finiĝas: "...igas la momenton kaŝi la profundan Shakespeare de la Tempo."! Ĉar la presisto ne povante distingi inter glosa kaj korekto permesis gloson rampi en la tekston.

§12 Nu iu Hispana monaĥo (almenaŭ tre verŝajne Hispana) legis la malfalsan version en 1 Jn5 pri la Spirito, la akvo, kaj la sango (kio supozeble aludas je Jn19:34), kaj pensis "Ĉi tio memorigas min pri la Triunuo."; do li supozeble skribis en sia marĝeno gloson pri la Atestantoj Ĉielaj, nome la Patro, la Vorto, kaj la Sankta Spirito. Iu novan ekzempleron laŭ ĉi tiu kopiante pensis "Jen io erare forgesita!", kaj permesis la gloson rampi en la tekston. Ĉiuj post tio ne volante, ke al ili io manku, deziris siajn ekzemplerojn enhavi la teksteron novan. Tempe do de Erasmo ĉiuj Vulgatoj

presitaj enhavis la falsan version.

§13 Sed la Grekaj MSoj ne. Erasmo do ne presigis ĝin; kaj ĉiu kontraŭ li furiozis, ke li “version elŝiris el la Biblio, la malvirtulo!”. Li kvazaŭ vetis: se ili povos montri al li MSON Grekan—sufiĉus unu—havantan la ekstrajn vortojn, li enmetos ilin en sia venonta eldono. Ili ja liveris unu el Anglujo, belan, puran, novan; tiel novan, ke oni povis vidi, ke ili skribis ĝin nur por venki lin. Do en sia venonta eldono (sia tria) li enmetis la falsan version ne dubante, ke ili lin trompis.

§14 Tiel alta staris la Erasma reputacio pri filologio (pro liaj aliaj verkoj, kie li pli zorgis), ke lian Grekan tekston kune kun ĝiaj eraroj kaj falsa verso kopiis ĉiuj, inter kiuj Franca tiama redaktanto Estienne (= Stefano); ties antaŭparolo estis kompreneble Latina, do li nomis sin Stephanus. Oni kutimigis nomi lian tekston la Ricevita Teksto (Latine: **Textus Receptus**; kaj ĝin kopiis preskaŭ ĉiuj Grekaj Testamentoj de la tempo Erasma ĝis proksimume 1900; mi nomas tri honorindajn esceptojn en §§115-117. Jen kiamaniere la *comma Johanneum* alvenis en la Anglan tradukon de 1611, sed ne en la Luteran tradukon de 1522, kiun Lutero tradukis laŭ la Erasma eldono unua.

§15 Por la kazo, se vi timas pri mia ortodokseco: kiam mi elĵetas tiun falsan version, mi ne ĉesas kredi, ke Dio estas Triunuo; tion oni povas montri per aliloke.

§16 Stephanus unua dividis la tekston laŭ versoj. Laŭ ĉapitroj dividis unua iu en Parizo ĉ.1200, verŝajne Stefano Langton, kiu iĝis ĉefepiskopo de Canterbury kaj helpis, ke la baronoj de Anglujo venku la Reĝon Johanon “Senteran”.

### Atestantoj

§17 Aŭdinte mian averton pri la *Textus Receptus* vi dezirus scii, kiamaniere kontroli la korektecon de diversaj N.Toj de vi vidataj; — mi parolas pri la korekteco de ilia teksto Greka kompreneble, ne pri ilia maniero tion traduki nacilingven. Se vi neniam studis la Grekan lingvon, vi dezirus

kompreni, kion volas diri komentarioj dirante ekzemple “Ĉi tiuj vortoj mankas en la Teksto Okcidenta.”, aŭ “La Ferrar-familio de minusklaj ĉi tie havas la *pericope adulterae*.”. Se la Grekan vi iomete studis, vi dezirus kompreni en via Testamento la *aparaton kritikan*, kio estas la nomo de la defluilo da ĉifraĵoj, kiu fluas ĉe la subo de ĉiu paĝo. (Se vi bone studis la Grekan, min vi ne bezonos).

§18 Se jam vin tedas la tuta temo, vi povas simple fidi mian juĝon, ke Grekaj Testamentoj antaŭ 1900 presitaj estas malofte fidindaj; kaj ke oni ne plene fidu la Vulgaton (nek nacilingvajn Testamentojn tradukitajn laŭ la Vulgato), nek la tradukon de Lutero, nek la Anglan de 1611. Sed, se vi deziras scii pli da detaloj, mi komencos katalogante mallongan kaj elektitan liston de kelkaj el la materialoj, kiujn redaktanto devas uzi: oni povas klasifiki ilin jene.

MSoj: papirusaj  
uncialaj  
minusklaj  
lecionaroj  
tradukoj  
Patroj

§19 Antikvaj MSoj ĉiaj uzis (plejparte) nenian distingon inter majuskloj kaj minuskloj, neniom da spaco inter vortoj, kaj nenian interpunkcion (krom ke iuj markis alineojn). Por la kazo, se vi studis la Grekan, mi aldonu, ke ili skribis preskaŭ neniujn spirajojn nek supersignojn. Ili estis supozeble terure malfacilaj por leganto.

## Papirusaj

§20 Papiruso estis la Egipta nomo por la kana planto, inter kiu oni kaŝis la infaneton Moseon. La kutimo estis distranĉi ĝin laŭ strioj kvazaŭ rubandoj; kuŝigi plurajn rubandojn, randon ĉe rando, vertikale, post tio surglui alian aron horizontale: tio liveris folion eble centimetrojn 20-30 longan. Ordinare oni skribis nur sur la flanko horizontalstria nomata la *recto*; sed, se oni bezonis, oni povis skribi



ankaŭ sur la *verso*.

§21 Tio taŭgis por letero. Se oni bezonis libron, oni kungluis plurajn tiajn foliojn rand-ĉe-rande, kaj rulvolvis tion cilindre. Oni elskribis la verkon laŭ kolonoj iom mallarĝaj, plejofte nur sur la *recto*. Unu rulvolvaĵo kapablis teni proksimume unu evangelion; tial antikvajn historiojn kaj epopeojn oni dividis en plurajn “librojn”

§22 *Kodekso* estis libro havanta paĝojn foliumeblajn, kiel en libro moderna. Oni unue uzis tiajn ĉ.100pK; sed dum pluaj du jarcentoj uzis kodeksojn nur la Kristanoj eble pro tio, ke ili ofte deziris meti kvar evangeliojn en unu volumon. En kodekso oni kompreneble skribis sur ambaŭ flankoj.

§23 Papiruson iom rapide putrigas ĉia malseko. Sed en Egiptujo, kiam oni grimpas super la plej altan Nilan inundon, malseko ne ekzistas; do inter la sabloj en antikvaj rubejoj kaj aliloke ni trovis abundon da papirusoj precipe fragmentojn: kvitancojn, lerneajn ekzercojn, invitojn, eta-tojn, magiajn sorĉojn, partetojn de Homero, kaj partetojn de la Biblio.

§24 Pli ol 70 papirusoj koncernas la N.Ton; sed por ŝpari al vi laboron mi katalogos nur malmultajn.

**p**<sup>45</sup>, unu el la tri antaŭe poseditaj de S-ro Chester Beatty. Ĝi enhavas partetojn de ĉiuj evangelioj, kaj estas skribita (ni povas taksi laŭ la skribmaniero) en la unua duono de la tria jarcento.

**p**<sup>52</sup> troviĝas nune en la Biblioteko “John Rylands” en Manchester. Ĝi mezuriĝas 6cm per 8cm; ĝi estas ĉifona; kaj ĝi enhavas nur proksimume kvin versojn el Jn18. Vi eble plendas, ke ĝi ne indas mian al vi raporton; sed, kiam vi aŭdas, ke la skribmaniero ŝajnas esti ĉ.120 aŭ 140pK, vi vidos, ke trovite en Egiptujo kaj ne Efeso ĝi eble helpas nin dati la kvaran evangelion.

**p**<sup>66</sup> = Papyrus Bodmer II, parte eldonita en 1956, kaj parte en 1958. Ĝi enhavas la plejparton de Jn, kaj ŝajnas

datiĝi de ĉ.200pK.

ⲡ<sup>75</sup> = Papyrus Bodmer XIV-XV; eldonita 1961. Grandajn partojn de Lk kaj Jn; frue en la tria jarcento.

## Uncialaj

§25 Tiuj estis papirusaj; jen ni komencas la pergamenajn. Kiam Konstantino en 313pK ĉesigis ĉian persekutadon je Kristanoj, subite farindiĝis skribigi N.Tojn multekostajn, aŭ eĉ tutajn Bibliojn. Konstantino ekzemple mendis kvindek grandajn Bibliojn por Di-servoj en preĝejoj de Konstantinopolo. De tiam ĝis ĉ. la deka jarcento oni nomas la MSojn uncialaj, aŭ ĉar iliaj literoj estis (preskaŭ) colon altaj, aŭ, pli verŝajne, ĉar dek du plenigis linion.

§26 Ekzistas pli ol ducent uncialaj de la N.To; kaj ili havas nomojn, plej ofte Latinajn adjektivojn (virseksajn por akordiĝi kun *codex*) por montri, kiu loko ilin posedas (ekz. Vaticanus) aŭ eble iam posedis (ekz. Sinaiticus). Sed aparato kritika estus longa kaj maloportuna uzante tiujn nomojn; do oni anstataŭigas ilin laŭ ĉifro. Ekzistas tri ĉifroj; la unuan el ili vi povas tuj forgesi. (1) Erudiciulo Germana, von Soden, elpensis ĉifron sciencan, kiun neniu iam uzas. (2) Al ĉiuj uncialaj oni donis numerojn komenciĝantajn per nulo (por distingi ilin je la minusklaj, kiuj havas numerojn ordinarajn ne per nulo komenciĝantajn). (3) Al la plej gravaj oni estis doninta majusklojn: kiam oni elĉerpis la Latinan alfabeton, oni uzis el la Greka la literojn ne-Latinajn kaj eĉ unu Hebrean א (=aleph). En astronomio vi povas nomi stelojn per Grekaj literoj kun la genitivo de la stel-grupo; la plej gravajn tamen, ekzemple la du plej brilajn stelojn en Gemini, oni preskaŭ neniam nomas “α kaj β Geminorum”, sed preskaŭ ĉiam “Castor kaj Pollux”. Simile uncialajn tiel gravajn, ke ili havas literojn, oni preskaŭ ĉiam nomas per iliaj literoj; ekzemple Codex Vaticanus (kiu kompreneble troviĝas en la Vatikano) ricevas la nomon “B” multe pli ofte, ol la nomon “03”. Uncialaj literojn ne havantaj ne rajtas elekti, kiel ne rajtas λ Geminorum.

§27 Kelkaj katalogoj uzas ankaŭ ekstran ĉifron aldonante

al MSaj literoj (aŭ numeroj) la literon e, a, p, aŭ r, por proksimume informi, kion ili enhavas:

e = *evangelium* = havas la evangeliojn

p = *paulus* = havas S-tan Paŭlon (+ *Hebreoj*)

a = *apostolus* = havas Ag kaj Ĝeneralajn Epistolojn

r = *revelatio* = havas la *Apokalipson*

§28 Jen listo de kelkaj **gravaj uncialaj** kun iliaj proksimumaj datoj.

ℵ = 01 = Codex Sinaiticus (4-a jarcento; e a p r). Oni rakontas tutan historieton, kiele Germana Luterano, Tischendorf, trovis la monaĥojn en Greka monaĥejo sur Monto Sinaj bruligantaj antikvan MSON por komenci siajn fajrojn. Ne permesite de ili ĝin tute ekzameni li igis, ke ili donacu ĝin al la caro de Rusujo, kiu permesis. La Sovjeta registaro proponis ĝin al Britujo kontraŭ ₣100,000; kaj nia registaro konsentis pagi duonon, se ni (la nacioj) volis kontribui la ceteran duonon. Ni kontribuis proks. ₣60,000; do vi nun povas vidi la Sinaiticus en Londono en la Brita Muzeo. Avertu: Romkatolikaj filologoj Hebrean literon eble ne volante uzi nomas Sinaiticus, ne ℵ, sed S; se vi tion faras, vi ne povas nomi 028 per la litero S, sed nur per 028.

B = 03 = Codex Vaticanus (4-a jarcento; en la Vatikano; e a p, sed mankas io, §82). Povas esti, sed ne tre povas, ke B kaj ℵ estis du el la kvindek preĝejaj Bibliojoj de Konstantino (§25). Ĉiam rimarku, kion legigas B kaj ℵ.

A = 02 = Codex Alexandrinus (5-a jarcento; Brita Muzeo; e a p r).

C = 04 = Codex Ephraemi rescriptus (5-a jarcento; Parizo; e a p r sed kun mankoj). La vorto *rescriptus* signifas, ke ĝi estas palimpsesto; tio estas, la N.Ton sur ĉi tiu MSo forfrotis iu ŝparema kopiisto, kiu post tio uzis la puretan pergamenon por surskribi verkojn de S-ta Efraemo Siria. Ĥemio tamen kaj granda peno povigis nin legi multon.

D = 05 = Codex Bezae, prononcata “Kodeks Bezaĵ” (ĉ. 500; Cambridge en Anglujo; e a). Ĝi estas dulingva havante la Grekan sur ĉiu maldekstra paĝo kaj la koncernan Latinan sur la dekstra. Ĉi tiu estas tiel eksterordinara MSo, ke mi multe pri ĝi informos vin en §§89ss.

D = 06 (ĉi tio estas alia D) = Codex Claromontanus (6-a jarcento; Parizo; p). Pro tio, ke ĉi tiu D havas, kiel vi povas vidi per la “p”, nur epistolojn (§27), dum ke la Codex Bezae havas nur evangeliojn kaj Ag, plejofte ne danĝeras nomi ambaŭ ilin “D”; sed, kiam vi opinias, ke vi riskas konfuzon, vi povas ĉi tiun nomi D2 aŭ DP. Ankaŭ ĉi tiu estas dulingva MSo, kio gravos en §85.

L = 019 = Codex Regius (8-a jarcento; Parizo; e).

W = 032 = Freer (ĉ.530; Washington, la urbo en Usono; e).

θ = 038 = Koridethi (9-a jarcento; Tiflisi, inter Rusujo kaj Turkujo; e).

046 = Vaticanus Graecus 2066 (8-a jarcento; Vatikano; r).

Mi ĉi tion enmetis parte por memoriĝi vin, ke nebrilaj steloj ne rajtas nomiĝi Castor kaj Pollux.

§29 Sur iuj MSoj oni povas distingi pli ol unu skribmanieron. Sur ekzemple Sinaiticus oni povas facile vidi la originan kopiiston, kiun ni nomas  $\mathcal{N}^*$  kun steleto. Poste pro tio, ke temas pri metiejo, sekvis la oficiala korektisto, kiu kontrolis ĝian korektecon; lian skribmanieron ni nomas  $\mathcal{N}^a$ . Post du jarcentoj iuj skribistoj kontrolis ĝin laŭ “tre antikva MSo”, kiel ili mem diras; ilin ni nomas  $\mathcal{N}^{ca}$  kaj  $\mathcal{N}^{cb}$ . Do ne miru, se vi vidos ekzemple B<sup>3</sup>; tio signifas nur iun postan skribiston, kiu supozis, ke li povas plibonigi Vaticanus.

## Minusklaĵ kaj Lecionaroj

§30 Ek de proksimume la deka jarcento, ĝis oni elpensis la presarton, skribistoj kutime skribis, ne per uncialoj (= proksimume majuskloj), sed per minuskloj (= nemajuskloj) aŭ per kursivaj (t.e. leterspeca skribmaniero). Oni uzis ankaŭ pli da mallongigoj. Sed kontraŭe ili ja uzis iomete da interpunkcio; apenaŭ eblis uzi malpli!

§31 **Lecionario** estis libro, kiu elskribis laŭ ordo kalendara la lecionojn epistolajn kaj evangeliajn por ĉiu dimanĉo kaj

festo en la jaro. Oni nomas lecionarojn *l1*, *l2*, k. t. p. Oni konas proksimume du mil, kio estas unu kaŭzo, kial mi ne por vi listigos ilin. La alia estas, ke oni ankoraŭ ne kontentige ekzamenis ilin.

§32 La **minusklaĵn** oni nomas (vi memoras) per numeroj kun neniu nulo ĉe iliaj komenciĝoj por distingi ilin disde la malpli konataj uncialaj, ekz. 046. Ni konas proksimume 2600, kio estas unu kaŭzo, kial mi ne por vi listigos ilin.

§33 La alia estas, ke la pli multaj el ili estas laŭ dato tiel malfruaj, ke sufiĉis al ili tempo (en tiom da kopiadoj) por kolekti abundon da eraroj. Eblas esceptoj: ekzemple 33 ŝajnas esti kopiita laŭ io iom fidinda. Sed ordinare, kiam vi vidas aparaton kritikan presi

$\omega$	=	<i>codices plerique</i>	=	la plej multaj MSoj, aŭ
<i>pl</i>	=	<i>plerique</i>	=	plej multaj, aŭ
<i>pm</i>	=	<i>permulti</i>	=	multegaj, aŭ
<i>rell</i>	=	<i>reliqui</i>	=	ceteraj, aŭ
$\Re$	=	<i>Koine</i>	=	la ordinara teksto (§62), aŭ
$\varsigma$	=	<i>st</i>	=	Stephanus (§14),

jen kiele diversaj redaktantoj avertas vin, ke la amasaĉo da malfruaj MSoj (kiel presita ekzemple en la *Textus Receptus* de Stephanus) ordinare ne meritas rimarkon. Pri kapoj ekzistas tri ebloj: la indiĝeno rompas ilin; la politikisto ilin nombras; kaj la saĝulo demandas, kio enestas.

§34 Sed 1 kaj 13 meritas mencion, ĉar ili havas familiojn. Kirsopp Lake, el Oxford kaj Harvard, rimarkis, ke 1, 118, 131, kaj 209 samopinias tiel ofte, ke ili supozeble estas kopiitaj laŭ unu sama (perdita) malkopio; ĉi tiun familion nomas diversaj redaktantoj fam.l, aŭ fl, aŭ 1&c, aŭ λ (supozeble la komenclitero de Lake). Simile Ferrar, el Dublin, rimarkis, ke 13, 69, 124, kaj 346 (kaj aliaj homoj rimarkis pluajn ok) oftege samopinias, kaj ŝajnas esti kopiitaj laŭ (perdita) malkopio en suda Italujo; ĉi tiun familion do oni nomas fam.13, aŭ fl3, aŭ 13&c, aŭ φ (supozeble la komenclitero de “Pherrar”!). Mi intencas nomi ilin fl kaj fl3.

## Tradukoj

§35 Ni ricevis ordonon prediki la evangelion al ĉiuj nacioj; kaj, kvankam S-ta Paŭlo povis en tiom da landoj iom sukcese parolante Greke (eĉ en Romo), ni baldaŭ bezonis traduki nian predikon en la Sirian, la Latinan, la Koptan, la Armenan, kaj plurajn pluajn lingvojn de la mezoriento. Se iujn el ĉi tiuj tradukoj oni faris en la periodo de ekzemple *N* kaj *B*, ili povas iom informi nin pri, kion diris iu MSo ilia-tempa (verŝajne jam perdita). Ili donas kompreneble ne la Grekajn vortojn; sed ofte estos klare, kiun el la variantoj ili favoras. Neniu postulas, ke vi komprenu la Sirian, Koptan, Armenan, Gotan, k.t.p.; do en aparato kritika oni kutimas aŭ ŝajnigi, kvazaŭ ili skribis Greke (mi volas diri: presi la Grekaĵon, kiun ili ŝajnas peni traduki) aŭ esprimi ilian varianton per Latino.

§36 **Latinaj tradukoj.** S-ta Hieronymus faris la Vulgaton ĉ.400pK, kiel mi diris en §7. Kvankam la Romkatolikoj jam scias, ke enestas nekorektaĵoj en la Siksta kaj Klementa Vulgatoj, ili konsideras sin devigataj laŭ la dekretoj de la Trentina Konsilantaro represi ĝin tia, kia lasis ĝin Papo Clemens en 1592, ĝis donos alian instrukcion Papo moderna. Iu Anglikana episkopo de Salisbury tamen (Wordsworth, pranevo de la poeto) kaj White en 1890 kaj sekvantaj jaroj redaktis Vulgaton, kiu pli fidinde reprezentas, kion skribis S-ta Hieronymus, ol povis Papo Clemens per la rimedoj de la dek-sesa jarcento. La N.Ton de la granda Wordsworth-White-a Vulgato presis poŝformate la Brita kaj Alilanda Biblia Societo; mia ekzemplero kostis 4 ŝilingojn. Jam vi povas diveni la signifojn de ĉi tiuj mallongigoj: *℣* (vg.), vg<sup>s</sup>, vg<sup>cl</sup>, kaj vg<sup>w</sup>.

§37 Sed S-ta Hieronymus ne tradukon novan faris: li reviziis la Latinan Malnovan = *Latina Vetus*, mallongigatan kiel OL aŭ *℣* (vt.). Ĉi tiu traduko originis ne (kiel vi eble divenus) en Romo; ĉar tie la eklezio estante plejparte alilandanoj kaj sklavo adoris Greke ĝis 200pK kaj eĉ poste: ĝi

originis verŝajne en la provinco, kiun la Romanoj nomis *Africa* sed ni “Tunisio”, kaj eble ĉe Marseille kaj ankaŭ aliloke. Multaj malgraŭ tio nomas la Malnovan Latinan la *Itala* mallongigata kiel *it*. Kiam *vg* kaj *it* samopinias, kelkaj redaktantoj registras la varianton kiel *lat*, t.e. ambaŭ tradukoj Latinaj; kaj ili ĝemeligas la *t* en *latt*, kiam samopinias ankaŭ la Latinaj Patroj.

§38 La Itala estas tiel grava, kaj ŝajnas tiel probable esti origininta en pli ol unu loko, ke ofte indas citi ĝiajn unuopajn MSojn. Oni ĉiam nomas ĉi tiujn per minuskloj por distingi ilin disde la majuskloj, kiuj signifas Grekajn uncialajn. Kvankam la Vulgato aperis c. 400pK, niaj MSoj de la Itala datiĝas de diversaj jaroj eĉ ĝis la jarcento dek-tria—tiel malrapide oni akceptas novajn ideojn; Komparu, kiel oni en Anglujo ankoraŭ presas la tradukon de 1611, kaj en Germanujo tiun de Luther. El la kvindeko aŭ pli da MSoj mi listos nur jenajn.

k = Bobbiensis (4-a jarcento; Torino; e, sed nur Mk kaj Mt, kaj ilin difektitaj). Afrika.

a = Vercellensis (4-a jarcento; Vercelli; e, kaj ne tuta). Eŭropa.

ff<sup>2</sup> = Corbeiensis II (5-a aŭ 6-a jarcento; Parizo; e, difektita). Eŭropa.

d. Ĉi tio signifas nur la dekstran paĝon de la dulingva Codex Bezae; vidu §28. Eŭropa.

m. Ĉi tio estas ne MSo: ĝi estas libro, la *Speculum* (= la Spegulo) antaŭe opiniita esti skribita de S-ta Aŭgusteno, sed nune esti veninta el Hispanujo. Ĝi konstante citas la Bibliion.

§39 **Siriaj tradukoj.** La korekta nomo de ĉi tiu lingvo estas la Arama; sed la Grekoj nomis ĝin la Siria, kaj ankaŭ ni, kiam ni parolas pri teksta kritiko. Ĝi tre similas la Hebrean. Kristo, kvankam, mi supozas, li parolis Greke al Pilato, parolis Arame al sia patrino (kiu nomis lin Jeŝua), al S-ta Petro (kiun li nomis Kepha), kaj al Fraŭlineto Jairo (al kiu li diris “Leviĝu, kapreoleto!”). Sed formortis la eta Juda eklezio; kaj por la loĝantoj de Damasko, Edessa, kaj

tiel plu, oni devis traduki la N. Ton en la Sirian el la Greka. Mi aŭdis sacerdoton Sirian legi la Lastan Vespermanĝon laŭ Mk en sia preĝejo sur la pretendata ejo de la hejmo de S-ta Marko en Jerusalemo. Se ĉiuj tradukoj Siriaj samopinias, onia mallongigo povus esti sy, aŭ S.

§40 La plej vaste disvojaĝinta traduko Siria estis la Peŝitta = syP = S (vg.). Sed ni havas unu-du MSojn de la Malnova Siria = S (vt.), ekzemple jenaj du: sy<sup>c</sup> = S (vt.<sup>c</sup>) = la Siria Cureton-a, unue eldonita de Cureton; kaj sy<sup>s</sup> = S (vt.s) = la Siria Sinaja, palimpsesto (§28C) trovita ĉe Monto Sinaj.

§41 **Koptaj tradukoj.** Kopto signifas Egipton, ĉar “Kopt” estas “Egipt” sen la E. La eklezioj Egiptaj skribis Kopte per altaŭgigita alfabeto Greka, ne per hieroglifoj. La tradukon Sahidan (= sa) oni uzis en Alta (= suda: la riveroj fluas alvale) Egiptujo; kaj la tradukon Bohajran (= bo) en Malalta Egiptujo, ekz. la buŝoj de la Nilo. Kie sa kaj bo samopinias, oni povas anstataŭe skribi co (= Copt). Ekzistis pluaj Koptaj tradukoj; sed sa kaj bo estas la plej gravaj por ni.

§42 **Aliaj tradukoj.** La solaj, kiujn mi mencias, estas la Armena (= A = arm) kaj la Gota (= G = got). La Gotan tradukis episkopo Ulfilas; en la Malnova Testamento li rifuzis traduki la librojn de Samuel kaj Reĝoj plede, ke en ili temas nur pri batalado, kiun (li diris) ĝuis la Gotoj sufiĉege sen plua instruo.

## La Patroj

§43 “Patroj” signifas la plej konatajn fruajn verkistojn Kristanajn, kies instruon oni plej fidis por juĝi debatojn. Kompreneble tiuj konstante citas la Bibliion; do oni esperus, ke iliaj citoj montros, kia teksto cirkulis en tiu urbo ilia-tempe. Do dekanon Burĝon en 1888 mortante testamentis al la Brita Muzeo dek ses kajeregojn da klasifikitaj citoj; tio



(li esperis) ege helpos nin; sed pro kialo, kiun mi klarigos en §46, ili estas tute neutilaj. Antaŭ ol mi tion klarigos, mi deziras doni al vi specimenaron de kelkaj konataj Patroj Latinaj kaj Grekaj. Patroj Sirie verkantaj ne iĝis konataj.

#### §44 **Patroj Grekaj.**

Ir = S-ta Irenaeus (mortis ĉ.200; Lyon en Francujo; jes, vidu, kiom la Greka lingvo disvastiĝis!). Li verkis *Kontraŭ la Herezoj* Greke: nur parto de la Greka originalo por ni pluekzistas, sed la tuto de traduko Latina. Oni povas referenci al ĉi tiu traduko kiel Ir<sup>lat</sup>.

Cl = S-ta Klemento el Aleksandrio (mortis c. 215). Li verkis ekzemple *Stromateis* (= Flikaro, kaj *Protrepticus* (= Admono), kaj *Quis Dives Salvetur?* (= Ĉu Riĉulo Povas Espera Paradizon?). Ne lin konfuzu kun S-ta Klemento el Romo (floris 96pK), kiu simile verkis Greke.

Or = Origenes (mortis 254). Studis en Aleksandrio sub Cl; sed poste instruis ĉe Cezarea en Palestino. Li redaktis libregon la *Hexapla*, kio estas la Malnova Testamento laŭ diversaj tradukoj Grekaj en ses kolumnoj. Or<sup>lat</sup>, kiel Ir<sup>lat</sup>, signifas tradukon.

Mcion = Marcion (mortis ĉ.160 ĉe Romo). Tiom impresis lin la malperfektoj de la Malnova Testamento, ke li instruis, ke nur dek libroj ekzistas en la Biblio: naŭ el la epistoloj de S-ta Paŭlo, kaj Luka evangelio, el kiu Mcion elcenzuris ĉian mencion pri la Malnova Testamento. Ĝenerala opinio en la eklezio tiom kontraŭis lin, ke plejparte ni konas liajn verkojn nur per citoj en liaj kontraŭuloj.

#### §45 **Patroj Latinaj.**

Tert = Tertullianus (mortis c. 220, Carthago. Kaj ne plendu, ke la Romanoj ĝin estis detruintaj: ili rekonstruis ĝin kiel urbon Romanan). Li estas, kiu diris “Semen est sanguis Christianorum.”, kion oni ofte citas en la formo “La sango de la martiroj estas la semo de la Eklezio”.

Hier = S-ta Hieronymus (mortis 420). Kompilis la Vulgaton en kaverno ĉe Bet-leĥem; vidu §36.

Aug — S-ta Aŭgustinus (mortis 430 ĉe Hippo en “Africa”).

Li estas, kiu verkis la *Konfesoj* kaj la *Civito de Dio*, Ne konfuzu lin kun S-ta Aŭgustinus de Canterbury, kiu tiom timis iri al Anglujo.

§46 **Patristaj citoj** (Patrista = el aŭ de la Patroj). La Patristajn verkojn oni ne tiel zorge redaktis, kiel la N.Ton. Krome plurajn oni redaktis kun (laŭ nia celo) malzorgo skandala. Krome en iuj redaktanto al loko alveninte, kie la Patro citas el la N.To, malatentis la MSojn kaj kopiaĉis el la Textus Receptus ĝojigante dekanon Burgon. Dekano Burgon malaprobis ŝanĝojn: li vizaĝe ruĝiĝis, kiam ni maloficialigis la Eklezion de Irlando; li elspiris fajretojn, kiam ni ŝanĝis la Diservajn lecionarojn; kaj, kiam en 1881 ni reviziis la Bibliion de 1611, li eligis bluan fumon el la oreloj. Lia argumento estis, ke io dum longa tempo daŭrinta ne povas ne okazi laŭ la gvido de la Sankta Spirito. Sed pro la malzorgemo de multaj redaktantoj Patristaj neniom utiias liaj dek ses kajeregoj; kaj neniou uzis ilin.

§47 Plua averto, antaŭ ol vi uzos Patristajn citojn. La Patroj ne havis paĝnumerojn en siaj N.Toj, nek ĉapitrojn, nek versojn (§16), nek konkordancojn, nek Bibliajn enciklopediojn; do por ili estis malfacile ion trovi, kion ili deziris citi. Por citoj mallongaj ili kutimis citi parkere; tial ili kapablis pli precize memori, ol ni. Longajn citojn ili kutime kontrolis serĉante; pri tiaj do ni povas pli fidi ilin. La sola parto de iliaj citoj, kiun ni povas tute konfidi, estas la vortoj, pri kiuj ili komentarias: se Aug citante Mt5:22 diras “La Grekaj MSoj ne havas la vortojn *sen kaŭzo*.”, tio ne povas esti nur lia malpreciza memoro, nek la malzorgo de lia redaktanto (§71).

§48 Plurfoje iu Patro (almenaŭ laŭ niaj pri li MSoj) ŝajnas citi saman verson malsame en pluraj lokoj de sia verkaro. Ekzemple Origenes ŝajnas uzi unu specon de MSo loĝante en Aleksandrio, kaj malsaman tekston migrinte al Cezarea. Por tion montri kelkaj redaktantoj ĉe tiaj fojoj citas lin kiel Or<sup>pt</sup>, kie pt = *partim* = “parte” kaj signifas “en partoj de la Origen-a verkaro”. Aliaj redaktantoj skribas Aug<sup>3/4</sup> en

unu loko, kaj Aug<sup>1/4</sup> en alia, por montri, ke S-ta Aŭgustinus citas tiun version kvarfoje, en unu tamen uzante malsaman esprimon.

## Sigla

§49 *Sigla* estas la Latina vorto por “mallongigoj”. Aug<sup>3/4</sup> estas unu *siglum*; MSo, kaj f13, kaj ç estas pluaj *sigla*; kaj pluaj estas (e a p r), kaj sy<sup>s</sup>, kaj N\*. La kutimo estas redakti pritekstajn notojn Latine parte pro tio, ke tempe de Erasmus neniu eĉ imagus presi libron per alia lingvo, parte pro tio, ke Grekan studintoj kutime studas ankaŭ Latinan, kaj parte pro tio, ke utilas havi lingvon internacian. Astronomio, medicino, kaj botaniko kaj zoologio, simile uzas terminojn Latinajn por esti internaciaj: stelo eksplodanta estas *nova*; ostoj en via spino estas *vertebra*; kaj du specoj de kverko estas *Quercus robur* kaj *Q. petraea*. Multon de la plej bona laborado pri tekst-kritiko oni faras en Germanujo; sed mi (mi ne scias, ĉu vi) nur malfacile legas Germane. Nune vi aŭ jam komprenas Latinon sufiĉe por diveni plej multajn el jenaj sigla, aŭ (se vi ne) baldaŭ pri ili vi kutimiĝos. Mi ne donos liston kompletan. Kaj diversaj redaktantoj diferencas laŭ siaj sigla; ie en sia antaŭparolo ili donas liston de la sigla, kiujn ili intencas uzi.

§50 Krampoj montras laŭvolajn ŝanĝojn; ekz. vi povas skribi aŭ “vid” aŭ “ut vid”, kiel vin plaĉas.

(ut) vid=	(ut) ut videtur	= (kiel) ŝajnas
fort	= fortasse	= eble
add	= addit	= li aŭ ŝi aldonas jenon
add	= addunt	= ili aldonas jenon
om	= omittunt, omittit	= ne havas jenon
secl	= secludit	= li forstrekas
praem	= praemittunt, -it	= antaŭmetas jenon
praep	= praeponunt, -it	= antaŭmetas jenon
pc	= pauci	= malmultaj MSoj
al	= alii	= aliaj
ap	= apud	= citata en la verkaro de

c.	= <i>cum</i>	=	kun
LXX	= <i>Septuaginta</i>	=	la ordinara Greka traduko je la Malnova Testamento

§51 Pluraloj en Esperanto finiĝas per -j; pluraloj Latinaj per diversaj finaĵoj. La kutimo do estas, ke, kiam oni deziras pluraligi iun siglum, oni duobligas ĝian lastan literon, jene.

cod	= <i>codex</i>	=	MSo (kun paĝoj)
codd	= <i>codices</i>	=	MSoj
rell	= <i>reliaui</i>	=	la ceteraj
v. l.	= <i>varia lectio</i>	=	variato
vv. ll.	= <i>variae lectiones</i>	=	variantoj
7s	= <i>7 et sequens</i>	=	7 kaj la sekvanta verso
7ss	= <i>7 et sequentes</i>	=	7 kaj la sekvantaj versoj

## Metodoj de Tekstkritiko

§52 “Estas tute simple, mia kara Watson: vi konas miajn metodojn; apliku ilin.”; tiel, aŭ proksimume tiel, parolas Sherlock Holmes, spertulo en alia fako de detektivismo, nome pri krimoj. Mi jen donos al vi ses el la metodoj de nia fako de detektivismo. Kiam vi pli scios, vi povos aldoni al mia listo; kaj eble iam vi aldonos al la scio de homaro elpensinte mem. Nun tamen ne provu studi jenajn sekciojn ne turnante vin al la lokoj en Biblio; en multaj sekcioj interese estas kompari malnovan tradukon kun moderna.

§53 **Subjektiva juĝo?** Mi komencas per ĉi tiu metodo, ĉar ĉiu deziras uzi ĝin; sed ĝi estas nefidinda kaj riska. Ĝi konsistas en, ke oni al si demandas ekzemple “Ĉu tiamaniere S-ta Paŭlo volus skribi al frua Kristano?”; kaj la danĝero estas, ke, se vi ne tre zorgas, vi baldaŭ taŭgigos la faktojn al via ideo pri S-ta Paŭlo anstataŭ inverse. Jen specimeno. En Jn7:8 du variantojn oni trovas en jenaj atestantoj:-

(i) Mi ankoraŭ ne supreniras al  $\mu^{66}$  B L W  $\theta$  f1 f13 pm

vg<sup>codd</sup> sy<sup>p</sup> sa  $\zeta$

(ii) Mi ne supreniras al  $\mathcal{N}$  D al codd ap Hier b ff<sup>2</sup> vg sy

bo arm Hier

Tio signifas:-

- (i) “ankoraŭ ne” troviĝas en iu papiruso, Vaticanus, Regius, Washington, Koridethi, la du familioj de minusklaj, *permulti* = multegaj MSoj iuj kodeksoj de la Vulgato, la *Peŝitta-Siria*, la Sahida Kopta, kaj la *Textus Receptus* de Stephanus.
- (ii) sed nura “ne” troviĝas en Sinaiticus, Bezae, *alii* = iuj aliaj MSoj, kelkaj MSoj menciataj de S-ta Hieronymus, du MSoj de la Itala (kio aludas, ke aliaj voĉdonis por la alia varianto), la Vulgataj MSoj (krom la por “ankoraŭ ne” voĉdonintaj), la Siria (sy<sup>s</sup> kaj sy<sup>c</sup>), la Bohajra Kopta, la Armena, kaj la propra opinio de S-ta Hieronymus.

(Vi baldaŭ atingos rapide interpreti ĉi tiujn sigla alku-timiĝinte; nun tamen rimarku, kiel mallonga kaj oportuna estas la ĉifro). Jen enpaŝas la politikemulo, kiu kapojn nombras: li diras “La siglum *pm* montras, ke la plimulto de la MSoj voĉdonas por la *Textus Receptus*.”; ni tamen lernis, ke *pm* plej konsistas el malfruaj MSoj, kies teksto povis dum abundo da tempo kolekti multajn erarojn. Jen enpaŝas la subjektiva juĝo, kaj diras “Ni scias laŭ verso 10, ke li ja iris (poste); kaj Jesuo ne emus mensogi; tial la *Textus Receptus* ne povas ne ĝusti.” Nu li povas pravi; sed ĉu vi ne riskas taŭgigi la faktojn al via teorio? Ĉu eble Jesuo diris “Mi ne iras.”, t.e. “hodiaŭ”, por liberigi sin je siaj iom malamikemaj (versoj 3-5) fratoj? Aŭ ĉu eble li ja intencis ne iri, sed poste (estante homo, ne nur Dio) ŝanĝis sian intencon? Aŭ ĉu eble sin kaŝas iu alia klarigo, kiun ni maltrafus, se ni fidus nian subjektivan juĝon?

§54 **Kunmikso.** Ekz. Mk6:33 (fino de la verso):-

- (i) kaj antaŭvenis ilin  $\aleph$  B L  $\theta$  13 vg sy<sup>p</sup> arm
  - (ii) kaj kunvenis tien D fl *a ff*<sup>2</sup> sy<sup>s</sup>
  - (iii) kaj antaŭvenis ilin kaj kunvenis tien A f  $\omega$   $\zeta$
- (Rimarku, parenteze, MSON 13 escepte malakordanta siajn familianojn). Ĉi tie povas ĉiu ajn vidi, ke (iii), la legaĵo de

la Textus Receptus, rezultatas pro skribistoj, kiuj sciis pri (i) kaj (ii) kaj ne volis, ke al ili io manku. Por elekti inter (i) kaj (ii) vi bezonos scii plion pri la ecoj de  $\aleph$  kaj B—kiel ekzemple tiuj tre malofte cedas al la tento legaĵojn kunmiksi (§58).

§55 **Difekto pro paraleloj** En la evangelioj ni ofte renkontas frazojn tre similajn je frazoj en alia evangelio; kaj la tento kompreneble estas igi ilin ekzakte similaj. Ekz. Mt19:17 havas du variantojn:-

(i) Kial vi nomas min “bona”? (*p*) C W  $\omega$  sy<sup>p</sup> sa Ir Or<sup>2/3</sup>  $\zeta$

(ii) Kial vi demandas min pri la Bono?  $\aleph$  B D L  $\Theta$  1 lat  
sy bo arm Or<sup>1/3</sup> Aug

Pro tio, ke (i) samas je Mk10:18 Lk18:19, niaj suspektoj vekigās, ke eble skribistoj Mkon kaj Lkon bone memorante difektis Mton per tiuj paraleloj. Kontraŭe, se vi kunopinias, ke Mt kopiis multon de sia evangelio el Mk, vi facile vidos, ke Mt eble indignis vidante Kriston (laŭŝajne) neanta sian Diecon, kaj eble klopodis “plibonigi” la frazon. Alia loko, kie Mt ŝajnas simile “plibonigi” estas Mk<sup>6/5</sup> povis fari // Mt13:58 faris. Iuj redaktantoj atentigas vin pri ebla difekto-pro-paraleloj presante “(*p*)”, ekz. §72.

§56 **Homoeoteleuton** = similaj finaĵoj. Antaŭ kelke da jaroj mi klopodis deĉifri leĝan akton de la jaro 1617. Verŝajne mi ofte eraris en ĝi, ĉar tia tasko bezonas inteligenton; sed amiko mia decidis presigi ĝin en libro de li verkata. Nu vi konas, kiom la leĝistoj amas vortgrupojn ripeti; la maŝin-skribistino de mia amiko permesis, ke ŝia okulo glitu de “plena kaj paca posedo kaj teno” en iu linio al “plena kaj paca posedo kaj teno” iom poste, kaj malsukcesis kopii tri liniojn da lingvaĉo nur pro tio, ke du pecoj finiĝis per similaj finaĵoj. Multaj specimenoj de homoeoteleuton ekzistas en la N.To; sed kutime ili tuŝas nur unu-du MSojn. Lk14: 27 tamen tute mankas (la tuta verso mankas) en dek unu Grekaj MSoj kaj en sy<sup>s</sup> vg<sup>cod</sup> bo<sup>cod</sup>. (Tiu “cod” signifas nur unu kodekson). Neniu emas diri, ke tiu verso devas ne enesti: temas nur pri homoeoteleuton, ĉar versoj 26 kaj 27

ambaŭ finiĝas per samaj vortoj.

57 **Proclivi scriptioni praestat ardua** = “Preferu la malfacilan varianton ol la facilan.”; tion diris Bengel, Germana Luterano antaŭ du jarcentoj. Ekzemple en Mt6:l, kie Kristo parolas pri almozado:-

(i) faru vian almozon  $\aleph^a$  L W  $\theta$  f136 $\omega$ k sy<sup>cp</sup> co arm CL $\zeta$

(ii) faru vian justaĵon  $\aleph$  \* $\aleph^b$  B D fl *al* lat sy<sup>s</sup> Or<sup>lat</sup> Aug Hier Kial li menciis justaĵon, kiam li parolas pri almozo? Pluraj kopiantoj decidus, ke (ii) ne povas ne esti eraro, kaj ŝanĝus ĝin al (i); sed neniuj kopiantoj ŝanĝis (i) al io malfacila. Multaj modernaj tradukoj pro sperto lerninte, ke  $\aleph$  kaj B estas kutime fidindaj, skribas “justaĵon” supozante version 1 ĝenerala enkonduko en la tri avertojn kontraŭ hipokriteco en versoj 2-18. La vera klarigo estas, ke la Judoj ĉe la periodo Krista ofte uzis la Hebrean vorton *cdaqa* (= justeco) por signifi almozon, kiel ni Angloj ofte uzas nian vorton *charity* (kiu propre signifas “amo”). Do memoru la averton de Bengel, preferi la malfacilan varianton ol la facilan.

§58 **Scio pri dokumentoj.** Dum Westcott kaj Hort konsiladis la Anglajn reviziantojn de 1881, ili verkis libron pri tekstkritiko je la N.To kiel la duan volumon de sia Greka Testamento (§116). En ĝi ili diris “Scio pri dokumentoj antaŭu finan juĝon pri variantoj.”; tio estas, vi ne multe progresos ne peninte decidi, kiuj MSoj estas plej fidindaj. Se interesas vin tabeligi (kvazaŭ vi laŭ specimenoj antaŭdiras baloton) la voĉdonojn de la MSoj en §§53-57 menciitaj, vi rimarkos du aferojn: unue, ke iuj MSoj preskaŭ ĉiam voĉdonas kun la sama partio (kiel vi vidos en §§62-65); kaj due, ke, se iras ĝuste niaj suspektoj pri, kiu partio pravas, iuj MSoj ŝajnas esti preskaŭ ĉiufoje en la prava tendaro, kaj aliaj en la malprava. Kompreneble la malmultaj versoj, kiujn mi ĝis nun montris al vi, ne estas fidinda specimenaro: multajn pluajn vi bezonos, antaŭ ol vi havos iom da certeco. Sed, kiam Westcott kaj Hort unufoje traserĉis la tutan N.Ton aplikante nur facilajn distingilojn ekzemple kunmikson kaj paralelojn, ili trovis atestaĵojn amasiĝantajn por du opinioj: (1) la granda amasaĉo da

malfruaj MSoj (kiujn fidis la *Textus Receptus*, Lutero, kaj la Angligo de 1611; memoru §33) preskaŭ ĉiufoje troviĝas en la tendaro evidente malprava; kaj (2)  $\aleph$  kaj B kun kelkaj amikoj siaj preskaŭ ĉiufoje en la evidente prava. Westcott kaj Hort post tio traserĉis duafoje la N.Ton aplikante ĉi tiun “scion pri dokumentoj” al versoj, kiuj ne aspektis evidentaj en ilia traserĉo unua; ekz. en §54 ilia unua facile malakceptis varianton (iii), kaj ilia dua instruis al ili, ke verŝajne pravas (i) favorite de  $\aleph$  kaj B. En §§61-65 mi montros al vi, kiele Westcott kaj Hort (aŭ, pli ĝuste, postaj eruditoj sur ilia fundamento konstruante) klasifikis la MSojn; sed antaŭe mi priskribu por vi unu pluan “metoon” ne pro tio, ke mi ĝin rekomendas, sed pro tio, ke vi aŭdos pri ĝi.

§59 **Konjekto??** Ĉe verkistoj antikvaj neKristanaj oni kelkfoje devas dependi de MSoj tiel malmultaj (Atendu, ĝis vi vidos §60!), ke ofte oni sentas, ke neniu el ili donas la legaĵon ĝustan; tiafoje oni divenas, aŭ, laŭ la ordinara termino, konjektas (§3). La mallongigo por “li konjektis” (Latine: *conjecit*) estas *cj*. Sed en la N.To inter ĝia riĉego da atestantoj oni neniam, aŭ apenaŭ iam, bezonas konjekti: ĉu la legaĵon deziratan ne havas almenaŭ unu atestanto? Jen tri versoj, kie iuj proponis korekton konjektan, kvankam mi listas ilin ne por rekomendi; en du el la tri vi vidos, ke unu MSo poste aperis jesante la konjekton.

Jn7:52: kaj Owen kaj Bultmann *cj*, ke litero O elfalis; reenmeti tiun O estus ŝanĝi “profeto” al “la profeto”, t.e. la Mesio (Readmono 18:15). Kiam oni trovis la papiruson  $\aleph^{66}$ , ĝi havis la pluan O.

Jn19:29 ili metis spongon sur hisopon (Greke *hussopo*); neniu certe scias, kiu planto estis hisopo, sed ĝi ŝajnas esti malgranda (1 Reĝoj4:33) kaj sufiĉe branĉhava por esti aspergilo (Eliro 12:22). Camerarius (mortis 1574) *cj* “malgranda lanco” = *husso*; kaj poste la minuskla 476 montriĝis havi *husso* verŝajne nur pro *lapsus calami* (= plumeraro), ĉar iu estis ĝin reŝanĝinta al *hussopo*.



1Petro3:19 (kvazaŭ tiu tekstparto antaŭe estas ne sufiĉe malfacila!) anstataŭ “en kiu ankaŭ” (Greke: *enokai*) Bowyer *cj* “Enoĥ” (*enoĥ*), kaj Rendel Harris *cj* “en kiu ankaŭ Enoĥ” (*enokaienoĥ*). Ĉi tiuj konjektoj aludas al la Libro de Enoĥ, ĉapitroj 6 kaj 7, kiuj tamen ne tre favoras ilin. La ordinara (kaj verŝajne korekta) teksto supozeble aludas pri, kiam Kristo ratis Inferon (la Kredkonfeso Apostola: “li malsupreniris en Inferon?”). Neniun el ĉi tiuj konjektoj favoras rimarkebla nombro da aprobantoj.

### Specoj de Teksto

§60 Mi deziras kompari la nombron da N.Taj MSoj kun la nombroj da MSoj de plej konataj antikvaj klasikuloj. Ĉar ankaŭ klasikaj verkistoj donas al ni tekstajn problemojn. Ekzemple, kiam Horaco (= Horatius) pri la imperiestro Augustus tiam reganta skribas en siaj *Carmina* (= Odoj) III iii 11, kvin MSoj legigas *bibit* (= trinkas), kaj du legigas *bibet* (= trinkos); kaj el miaj ekzempleroj ok redaktantoj presigas *bibit*, kaj tri *bibet*. Sed diferencon faras en nia opinio pri Horaco, ĉu li skribis per komplimento, ke la imperiestro “trinkos” inter la diuloj, aŭ per servutema flato, ke li jam tie “trinkas”. La nombrojn, kiujn mi tuj pri diversaj verkistoj donos, mi tiras el la antaŭparoloj en miaj ekzempleroj; kaj mia pri ili scio estas eble ne tiel ĝisdata, kiel mia pri la N.To. Mi nombros nur MSojn, ne tradukojn, k.t.p. En 275pK regis Roma imperiestro Tacitus, kiu fierante esti prafilo de la historiisto Tacitus ordonis fari ekstre grandan nombron da ekzempleroj de ties verkoj; malgraŭ tio proksimume 25% de liaj 30 “libroj” ankoraŭ ekzistas en nur unu MSo, kaj proksimume 50% en neniun — t.e. ilin ni ne posedas. El la 142 “libroj” de la historio de Livius 106 simile perdiĝis havante neniun MSojn. Por la *Respubliko* de Platono la Kembriĝ-a eldono mencias 18 MSojn; sed verŝajne ekzistas pluaj. La plej konata redaktanto je la poezia filozofio de Lucretius mencias por ĝi 21 MSojn. La Kembriĝa

eldono je la tragedioj de Sophokles mencias 104 pri li. Kaj por la *Ilias* de Homero, kiun mi supozas la plej populara poemo inter la antikvuloj, la Oksforda eldono listas 290.

§61 Komparate kun ĉi tiuj nombroj la N.To poentas proksimume 5000. Kiele redaktanto manipulu tian amasegon? Kaj la tradukojn kaj la Patrojn? Nu ni havis gvidon en §34, kie ni trovis, ke dek ses el la minusklaj sin klasifikas en du familiojn de MSoj kutime samdirantaj. Do de la tempo de Westcott kaj Hort ni penadas niajn atestantojn klasifiki en diversajn specojn de teksto. Ni ne povas esperi, ke ĉiuj en unu grupego tia MSoj samdiros tiel ĉiam, kiel ekz. f13; do filologoj senĉese argumentas, kiu klasifiko estas plej vera. Jena klasifiko, kiun mi tuj donos, aspektas sufiĉe probable, kvankam multaj filologoj deziras ĝin plibonigi; ĝi montros al vi almenaŭ tion, pri kio ili debatas. La kvar tekstoj tuj donotaj ricevas diversajn nomojn en la libroj de filologoj diversaj.

§62 **La Kojne-Teksto** = Eklezia Teksto (ĉar oni uzis ĝin en preĝlibroj) = Bizanca Teksto. Ĉi tiu estas la teksto montrata de la amasaĉo de niaj malfruaj minusklaj. *Kojne* Greke signifas “komuna”; kaj kelkaj redaktantoj nomas ĉi tiun tekston per majuskla Germana **K**. Iuj opinias, ke ĝi naskiĝis ĉe Antioĥia (sub Lucianus) kiel “Siria Teksto”; ĉiukaze ŝajnas, ke ĝi kreskis en Bizanco (= Konstantinopolo = Iŝtambul) inter proks. 600 kaj la unua presarto. Ĝi iĝis la *Textus Receptus*, ĉar tempe de Stephanus oni ne pli sciis; kaj laŭ ĝi tradukis kaj Lutero kaj la Angloj de 1611. Redaktantoj kutimas reprezenti ĝin en sia aparatus criticus per unu el la sigla en §33. En la evangelioj ĝiaj atestantoj inkluzivigas: A (kutime), C, W (en Mt kaj parto de Lk), la plimulto de la minusklaj kompreneble, sy<sup>p</sup>, got, kaj ĉ.

§63 **La Cezarea Teksto** = Teksto Theta. Iuj jam opinias, ke ĉi tiu teksto komenciĝis en Egiptujo, antaŭ ol ĝi iam alvenis ĝis Cezareo (la ĉefurbo de la Romana provinco Palestino); do Metzger (§108) faras du subgrupojn:-

(i) Antaŭ-Cezarea (ankoraŭ en Egiptujo): **ϑ**<sup>45</sup>, W (en parto

de Mk), f1, f13.

(ii) Cezarea (eble kunportita de Origenes el Egiptujo §44):  
θ (en Mk), arm, Or (postaj verkoj).

§64 **La Aleksandria Teksto** = Egipta Teksto. Westcott kaj Hort (§116 kaj §58) nomis ĉi tiun la Neŭtrala Teksto opiniante, ke neniuj difektis ĝin iudirekten; nune tamen ni ne tiom kuraĝas, kaj ni diras nur, ke ĉi tiu estas la plej bona teksto, kiun la plej eruditaj Kristanoj en Aleksandrio povis kunmeti en la tria (Metzger opinias, la dua) jarcento. Iuj opiniis, ke ĝi estas la verko de filologo nomata Hesychius. Ni trovas ĝin en: B,  $\aleph$ ,  $\mathfrak{P}^{66}$ ,  $\mathfrak{P}^{75}$ , Cl, Or (fruaĵ verkoj); kaj kun iuj malsamaj ankaŭ en L, W (en Jn kaj parto de Lk), 33, bo.

§65 **La Okcidenta Teksto.** Jen ni atingas la misteron. Pluraj ĉi tiuj atestantoj venas el okcidentaj partoj de la Roma imperio; sed, kiam ni vidas ankaŭ la Malnovan Sirian en la listo, ni nin demandas, ĉu “okcidenta” teksto tiel vaste dissemita ne povas enteni multajn legaĵojn pli antikvajn ol la Aleksandria Teksto. Tio estas alloga teorio; sed nin for de ĝi emas peli du faktoj: (a) ke la plej konata Okcidenta atestanto, D, estas tiel freneza, ke mi devos lin trakti solan en §§89-97; kaj (b) ke la supozataj membroj de la Okcidenta Teksto inter si malsamas pli, ol de ĉiu alia teksto. Jam vi komprenas, kial mi nomis ĝin mistero. Ĝiaj atestantoj inkluzivigas: D, W (en parto de Mk), it, sy<sup>s</sup>, sy<sup>c</sup>, Tert, Mcion, Ir.

§66 Du avertoj. Mi listis nur tion, kio ŝajnas vera pri la evangelioj, ĉar mi opiniis la vortojn kaj agojn de Kristo pli gravaj ol de S-ta Paŭlo kaj ceteraj; pri la epistoloj k.t.p. vin turnu al la libroj, kiujn mi listis en §§100-113. Kaj memoru, ke (kiel mi diris) ĉi tiu grupado estas debatata; do ne miru, se vi trovos libron, kiu malsamopiniis je mi.

## Kelkaj Specimenoj

§67 **S-ta Marko.** Mk1:2 en la profetoj A W f13  $\omega$  arm Ir<sup>2/4</sup>  
ç] en la profeto Jesaja  $\aleph$  B D L  $\theta$  f1 *al* sy<sup>p</sup> co lat Ir<sup>2/4</sup> Or.

La citaĵo venas efektive ne nur el Jesaja40:3 sed ankaŭ el Malaĥi3:1; do vi povus facile imagi skribanton korektanta “Jesaja” al “profetoj” sed ne inverse. “Jesaja” do meritas venkon laŭ §57 krom ankaŭ laŭ tio, ke ĝi kombinas §64 kun §65 kaj eĉ kun eroj de §63.

§68 Mk1:29 “li” eniris B D W θ f1 f13 *al* it sy<sup>s</sup> arm, “ili” eniris N A C L *pl* vg sy<sup>p</sup> bo. La paralelo en Lk4:38 havas “li”; kaj tio laŭ §55 nin inklinas ne tre certe al “ili”. Ĉu tio signifas, ke S-ta Petro rakontis la anekdoton ĉiufoje kun “ni”; kaj ke S-ta Marko tiun formon de la anekdoto parkere sciante ŝanĝis “ni” al “ili”, ĉar ne li ĉeestis? Provu esprimi la tutan version laŭ la vortoj de S-ta Petro. Ekzistas ankaŭ aliaj eblaj kazoj de la sama afero aliloke en Mk.

Por Mk1:41 vidu §97.

Por Mk6:33 vidu §54.

§69 Mk7:19. Ĉi tie diferencas unu litero: en la participo *katharizon* = “purigante” (“indigante”), se la O estas omikron, la vorto estas neŭtra kaj akordiĝas kun la “ĝi” en “ĝi eniras ne en lian koron”; sed, se la O estas omega, la participo estas virseksa kaj akordiĝas kun la “li” en “li diris” en verso 18. Neŭtra  $\mathfrak{K}$  sy<sup>s</sup> cl virseksa N A B L W θ f1 f13 Or. Do S-ta Marko ne nur registras por ni la diraĵon, sed ankaŭ montras la konkludon, ke Jesuo permesas al ni manĝi porkaĵon.

§70 Mk16:9-20 A D L W θ f1 f13 *pl* lat sy<sup>cp</sup> co Ir c] *om* N B sy<sup>s</sup> arm<sup>codd</sup> Cl Or] malsaman finon

Kaj ili mallonge raportis la tutan sendaĵon al Petro kaj liaj. Poste ankaŭ Jesuo mem dissendis per ili de oriento ĝis okcidento la sanktan kaj ne pereontan predikon de eterna savo.

L *k* sa. Rimarku, ke L havas ambaŭ finojn; kaj N kaj B havas neniun. W havas la pli longan kun proksimume kvar ekstraj versoj (tre ne verŝajnaj) inter 16:14 kaj 16:15. Unu MSo de arm diras, ke la pli longa fino (= 16:9-20) estas verkita de la presbitero Ariston. Ĝi ĉerpas ĉiom de sia informo el la ceteraj evangelioj. Nu evidente nek la pli longa

nek la mallonga fino estas verkita de S-ta Marko. Sed pensu: neniu planus fini evangelion per 16:8, ĉu? En mia menso mi havas du (alternativajn) bildojn. Unu estas S-ta Marko en domo en Romo rapidanta fini sian evangelion; laŭte iu frapas la stratpordon; la polico; oni arestas lin kaj martirigas. La alia bildo estas, ke li finis sian evangelion per kvino da aperoj de Jesuo reviviĝinta; sed sian unuan aŭtografon li pruntedonis; ĉar iu (eble Rufo Mk15:21 Romanoj16:13) diris “Bonvolu permesi, ke mi faru por mi kopion. Mi tre tre zorgos Ja originalon.”; pordfrapo (kiel antaŭe); sed Rufo, antaŭ ol arestiĝi, sukcesas ŝovi la originalon sub la matracon ŝirante la lastajn tri paĝojn. Avertu: se li tenus la rulaĵon kunvolvita, la lastaj tri “paĝoj” (= kolonoj) estus en la mezo de la rulaĵo.

§71 **S-ta Mateo.** Mt5:22 koleras sen kaŭzo  $\mathcal{N}^*$  D L W  $\theta$  f1 f13  $\Re$  it sy co arm Ir<sup>2/3</sup>  $\zeta$ ] koleras  $\mathcal{N}^*$  B vg<sup>codd</sup> Or Ir<sup>1/3</sup> Tert codd ap Aug (§47), *codd ap* Hier. Vi havas tri kialojn decidi, ke “sen kaŭzo” devas ne enesti: (a) la atestoj de la plej bonaj MSoj; (b) vi povus kompreni, ke kopianto emas diri “Ĉi tio estas malfacila ĝis neebleco; evidente, ke elfalis io simila je *sen kaŭzo*; mi reenmetos ĝin.”? sed ne inverse; kaj (c), kiel Tolstoj rimarkigas, se Jesuo diris la frazon kun “sen kaŭzo”, li malŝparis sian spiron por nenio, ĉar neniu koleriĝas ne opiniante, ke li havas bonegan kaŭzon.

Por Mt6:1 vidu §57.

Por Mt19:17 vidu §55.

§72 Mt22:23 kiuj diras (*p*)  $\mathcal{N}^c$  L  $\theta$  f13 *pl* lat co arm<sup>codd</sup>  $\zeta$ ] kaj diris (ellasante en la Greka nur du literojn)  $\mathcal{N}^*$  B D W f1 *pm* sy Or. La (*p*) vin avertas turni vin al la paraleloj Mk12:18 Lk20:27; kaj laŭ §55 suspektoj pri difekto pro paraleloj aldonas sian pezon al B kaj la unua mano de  $\mathcal{N}$ . Se “kaj diris” ĝustas, la Sadukeoj supozante Jesuon Fariseo intence trenis lin en debaton pri vivo postmorta por venki lin (ili esperis) per sia imaga vidvino.

§73 Mt27:16s Barabas *rell*  $\zeta$ ] Jesuo Barabas  $\theta$  f1 *pc* sy<sup>s</sup> arm Or. Vi povus imagi indignantan kopianton decidi ne kopii

la “Jesuo”; sed ne inverse, Ni scias, kion signifas bar Arame (Mk10:46); do eble la liberigitan kriminton oni nomadis Jeŝua filo de Abba.

§74 **S-ta Luko.** Lk2:14 bonvolo al homoj  $\mathcal{N} B^3 L \theta f1 f13 pl$   $sy^{sp}$  bo arm Or<sup>pt</sup>  $\varsigma]$  al homoj de bonvolo (malsamo de unu litero)  $\mathcal{N}^* A B^* D W pc$  latt sa got Or<sup>pt</sup> Ir<sup>lat</sup>. (Por “B<sup>3</sup>” vidu §29; por “Or<sup>pt</sup>” vidu §48; kaj por la duobla t en “latt” vidu §37 kaj memoru, ke tio inkluzivas la Vulgaton, la tradukon, kiun oni surskribus en preĝejo en Romo.). Klare estas, ke “de bonvolo” venkas; sed kion ĝi signifas? Ĉu ĝi signifas: (1) la al aliaj bonvolon montrantajn; aŭ (2) la ricevantajn bonvolon de Dio? Kiam la Usonano Mark Twain, kiu kutimis legi “bonvolo al homoj”, iam vizitis S-tan Johanon Lateranan en Romo (*Innocents Abroad* ĉapitro xxviii), li miris vidi laŭ la Vulgato “homoj de bonvolo”; kaj, verŝajne interpretante ĝin signifi (1), diras “Tio ne estas bona Bibliaĵo; sed ĝi estas vera naturo homa kaj katolika.”

§75 Lk4:44 Galileo ( $p$ )A D  $\theta f13 pm$  latt  $sy^p$  bo arm  $\varsigma]$  Judujo  $\mathcal{N} B C L W f1$  al sys sa bo<sup>cod</sup>. Ĉifoje vi rimarkas per la unu d en “cod”, ke nur unu Bohajra MSo legigas “Judujo”; tial mi ne povis mallongigi “sa bo” al “co” (§41). La ( $p$ ) avertas vin turni vin al Mk1:39 Mt4:23; kaj ili metafore turnas vin al §55. Rimarku ankaŭ, kiuj MSoj favoras “Judujo”: la ĉefaj Aleksandria-Tekstaj, unu familia Cezarea, kaj la “Okcidenta” Siria el Sinaj. Nu unu el la argumentoj, ke oni ne fidu la kvaran evangelion kiel historion, estas, ke la plimulto de Jn2:13-11:54 okazas ĉe Jerusalemo (aŭ almenaŭ en Judujo), dum ke la sinoptikuloj raportas nenion de Jesuo en Judujo farita inter lia dek-du-jara aĝo kaj Palma Dimanĉo. S-ta Hieronymus (*de Viris Inlustribus* ix) diras, ke la sinoptikuloj rakontas nur la lastan jaron el la predikado de Jesuo, nome post kiam oni arestis Johanon la Baptiston; kaj ke la kvara evangeliisto decidis ŝtopi ilian mankon. En Lk13:34 = Mt23:37 la Jesua “kiom ofte” pensigas, ke li jam antaŭe plurfoje invitis; ĉu Lk4:44 estis unu el la fojoj?

Por Lk6:5 vidu §90.

Por Lk14:27 vidu §56.

Por Lk22:19s vidu §91.

Por Lk24:51 vidu §92.

§76 **S-ta Johano.** Jn1:3s (Ĉi tie temas nur pri interpunkcio) aparte de li estiĝis. nenio, kio estiĝis. En li estis la vivo... C<sup>3</sup> fl pm vg<sup>cod</sup> sy<sup>p</sup> bo] aparte de li estiĝis nenio. Kio estiĝis en li, estis la vivo... A<sup>vid</sup> C\* D L W θ al vg<sup>codd w s</sup> it sy<sup>e</sup> sa Cl Ir Or Tert Aug. (Se vi jam forgesis, kion signifas “vid”, vidu §50; kaj, se vi forgesis “vg<sup>w s cl</sup>”, vidu 36). Pro tio, ke plej multaj MSoj havis nenian interpunkcion, mi ne povas citi plej multajn pri ĉi tio; sed la Patroj igas klara, kiamaniere ili aŭdis ĝin legatan en sia urbo. Antaŭ Nikaja (= 325pK) preskaŭ ĉiuj Patroj metas la punkton post “nenio”. Post Nikaja ili unuanime sin turnis por meti ĝin post “estiĝis” eble timante, ke iu Ariano citos ĝin laŭ la antaŭa formo por peni pruvi, ke la Sankta Spirito (la “lumo de la homoj”) bezonis estiĝi anstataŭ ĉiam esti.

§77 Jn1:18 solenaskita Filo A C<sup>3</sup> W θ fl f13 pl latt sy<sup>e</sup> sa arm Cl<sup>2/3</sup> Ir<sup>2/3</sup> Tert ç] solenaskita Dio ꝥ<sup>66</sup> N B C\* L sy<sup>p</sup> bo Cl<sup>1/3</sup> Ir<sup>1/3</sup> Or Hier. La pli fidindaj MSoj voĉdonas por “Dio”; sed al tio tentus ilin deziro.

§78 Jn1:41 (Diferenco de unu litero en la Greka vorto por “unua”: *proton* estus akuzativo, kaj *protos* nominativo) *proton* ꝥ<sup>66</sup> N<sup>c</sup> A B θ fl f13 pm lat sy<sup>cp</sup> co arm] *protos* N\* L W al ç] *proi* (=“frue”) it<sup>3</sup> <sup>codd</sup> sy<sup>s</sup>. Tie evidente *proi* cedas. Nu *proton* signifus, ke la unua, kiun Andreo venigis, estis lia frato; poste li venigis iun pluan. kaj *protos* signifus, ke Andreo estis la unua, kiu venigis sian fraton; poste iu alia venigis sian. Inter la apostoloj estis nur du paroj da fratoj, Petro-Andreo kaj Jakobo-Johano; se *protos* ĝustas, ĉu ni pro ĝi povas nomi la neAndrean personon en verso 40?

§79 Jn5:l festo ꝥ<sup>66</sup> A B D W θ fl f13 al sy<sup>c</sup> Or Ir ç] la festo N C L pm sa. Se ĝustas “la festo”, temas supozeble pri la Juda Pasko; kaj tio eble helpus nin decidi, dum kiom da jaroj Kristo predikadis: ĉar la predikado en la sinoptikuloj povus facile kunŝoviĝi en unu jaron, ili donas tiel malmultajn signojn datajn sed Jn (se ni povas fidi lin pri historio) havas Paskojn ĉe 2:23, 5:1 (?), 6:4, 11:55. Sed mi avertas

vin: (a) mi legis librojn, kiuj diris, ke “la festo” estus la Pentekosto aŭ Laŭboj aŭ Purim; (b) iuj opinias, ke ĉapitroj de Jn perdis sian ordon.

Por Jn7:8 vidu §53.

Por Jn7:52 vidu §59.

§80 Jn7:53-8:11=la *pericope adulterae*=la alineo de la adultintino. Mi ne parolas pri ĝiaj vortoj, kvankam ili tre varias: mi parolas pri ĝia loko. Ekzistas kvar lokoj: metas ĝin ĉi tie D *pm* it<sup>codd</sup> vg Aug c] havas ĝin kiel postskribaĵon ĉe la finfino de Jn. f1 *pc*] havas ĝin post Lk21:38 f13] *om* (=nenie havas la alineon)  $\mathfrak{A}^{66}$   $\mathfrak{N}$  A<sup>vid</sup> B C<sup>vid</sup> L W  $\theta$  *al a sy*<sup>p</sup> sa<sup>pt</sup> bo<sup>pt</sup> arm Ir Cl<sup>vid</sup> Or Tert. La kaŭzo, kial A kaj C havas “vid”, estas, ke al ambaŭ hazarde ĉi tie mankas kelkaj paĝoj sed ne sufiĉaj por enteni ĉi tiun *pericopen*. Jam evidentas, ke ne Jn verkis ĝin: eble ĝi estas glosa (§11) apudskribita en ies marĝeno por ilustrati Jn8:15. El kie ĝi venis? — Ĉu eble el Q? Kial nek Mt nek Lk uzis ĝin?—Eble ili timis, ke la anekdoto logas Kristaninojn adulti neniom punote krom per milda riproĉo. Kiam ĝi okazis (se iam)?—La plej taŭga loko estus proksimume Lk 20:26=marde en la Sankta Semajno, kiam ili klopodadis kapti lin per ĉi tiaj dilemoj; sed f13 ŝajnas voĉdoni por merkrede.

§81 Jn13:2 (en la Greka malsamas nur unu litero) vespermanĝinte  $\mathfrak{A}^{66}$   $\mathfrak{N}^c$  A D  $\theta$  f1 f13 *pl* lat Or<sup>4/5</sup> c] vespermanĝante  $\mathfrak{N}^*$  B L W *pc d* Or<sup>1/5</sup>. Rimarku, ke D kaj *d* inter si kontraŭdiras el kontraŭaj paĝoj; aŭ ĉu vi forgesis, kiu estas *d* (§38)?

Por Jn19:29 vidu §59.

§82 **Cetero de la N.To.** Ne miru, se kelkaj el la MSoj tuj citotaj estas al vi freŝaj: pensu, ke pluraj el la jam cititaj (ekz. L W  $\theta$ ) neniam entenis pli ol la evangeliojn; kaj, ke ekzemple B iam entenis la tutan Malnovan Testamenton (sen la Makabajoj) kaj N.Ton, sed nune formortas ĉe Hebreoj 9:14.

Por Ag vidu §93-95.

§83 Subaj skribaĵoj en epistoloj: en iuj Bibliojoj oni presas ĉe la fino de epistolo noton mallongan pri la loko, kie S-ta Paŭlo verkis ĝin, kaj pri la skribanto. Mi ne scias, kiu ĉi



tiujn aldonis, nek, ĉu li nur konjektis. Sed la MSoj malsamopiniis: L havas notojn longajn, multvortajn; kaj plejmultaj MSoj havas neniujn. En la suba skribaĵo pri ekzemple *Romanoj* iuj MSoj (inter kiuj ankaŭ L) diras ke Febe (Romanoj 16:l) skribis la leteron; unu diras, ke skribis ĝin Tertio (Rom 16:22), sed, ke Febe portis ĝin, ĉar ne ekzistis poŝto. Mi supozas, ke esti sekretario de S-ta Paŭlo estis posteno ne facila.

§84 Kie la unua Rom finiĝis? La adiaŭaj versoj (ordinare presataj kiel Roml6:25-27) aperas en jenaj lokoj: post 16:24  $\aleph$  A B D lat sy<sup>p</sup> co arm Cl Or ç] post 15:33  $\aleph^{46}$ ] post 14:23 A L al arm *codd ap* Or ] *om* Mcion *codd ap* Hier. Mi esperas, ke vi rimarkemas kaj rimarkis, ke A kaj arm havas ĝin dufoje. Se vi forgesis, kiu estas Mcion, vin turnu al §44.

§85 Galatoj4:25, loko malfacilega. La MSoj malsamas, ĉu komenci la frazon per: (i) *togaragar...*, aŭ (ii) *togar...*, aŭ (iii) *toagarde . . .*, aŭ (iv) *tode . . .*; memoru, ke ili havis neniujn spacojn inter vortoj, kaj ke la Greka havas neniun literon por H. La voĉdonado por la kvar variantoj estas: (i) Ĉar Hagar estas la Monto Sinaj en... L *pm d* sy<sup>p</sup> arm ç] (ii) Ĉar la Monto Sinaj estas en...  $\aleph$  C lat arm<sup>codd</sup> Or Hier Aug] (iii) Nu Hagar estas la Monto Sinaj en... A B D al bo] (iv) Nu la Monto Sinaj estas en...  $\aleph^{46}$  sa] (v) *om* la tutan frazon Mcion sy<sup>sc</sup>. Ne klopodu solvi ĉi tion, antaŭ ol vi lernos kiel prononci la Araban vorton, kiu signifas “roko”. Sed rimarku detalon: La Latina kaj Greka paĝoj de D<sup>2</sup> (vidu §28 D sa 06) inter si kontraŭdiras, kiel kontraŭdiris tiuj de la Codex Bezae en §81.

§86 Efesanoj1:1 en Efeso  $\aleph^c$  A B<sup>3</sup> D G L *pl* lat sy ç] *om* p46  $\aleph^*$  B\* Mcion Or. Kaj Mcion titolas la leteron “Epistolo al la Laodikeanoj” (komparu Koloseanoj4:16). Vi verŝajne scias la teorion, ke *Efesanoj* estis unue adresita al ĉiuj la eklezioj en “Azio” (Apokalipso1:4,11) kaj ĉirkaŭsendata.

Por 1Petro 3:19 vidu §59.

Por Un5:7s vidu §§12-14.

§87 Apokalipso1:5 nin lavis = *lousanti* 046 al vg bo ç] nin

savis = *lusanti* N A C 1 *pm* sy arm. Eble vi diros, ke ambaŭ same rezultatas; sed vidu, kiele diferenco de unu litero mal-similigas la manieron esprimi.

§88 Apok13:13 “666” A 046 1 *pm* Ir Or] “616” C arm<sup>pt</sup> 2 *coold ap* Ir. Sed pensu, ke lerninte la regulojn interpreti literojn per numeraloj tuj vi povos igi, ke ĉiu nombro signifu preskaŭ ĉion: antaŭnelonge (*BR* numero 3) mi igis, ke “666” signifu po unu Kruŝĉof, Kennedy, kaj Johnson.

### La Codex Bezae

§89 Teodoro Beza, Franca Protestanta filologo kaj amiko de Kalvino, donacis ĝin al la universitata biblioteko de Cambridge en 1581; kaj post tio ĝi estas ankoraŭ por ni enigmo. Ĝi nune entenas la evangeliojn kaj Ag (ĝis Ag22:29) per du lingvoj: Greka (=D) maldekstre kaj Latina (=d) dekstre. Ambaŭ lingvojn oni skribis en linioj malsame longaj komencante novan linion proksimume ĉiufoje, kiam voĉleganto paŭzus; supozeble la skribanto tion faris por unu el du celoj: aŭ por helpi leganton manipuli la voĉon (do mi ofte imitas ĉi tiun rimedon, kiam mi maŝinskribas tekstojn por skolta Di-servo), aŭ helpi iun Greke ne tre komprenantan vidi, kiujn vortgrupojn oni tradukis per kiuj vortgrupoj Latinaj. Iu superstiĉa skribaĉis frazojn aŭgurajn piede de paĝoj tiel, ke ĉiu stultulo tian aferon kredanta povu hazarde malfermi la libron kaj legi sian estontecon. La teksto mem (min ne interesas la aŭgurado) aspektas esti skribita ĉirkaŭ 500pK; kaj verŝajna loko estus la regiono de Marse-ille. Specimenojn de ĝiaj strangaj variantoj mi donos al vi; kelkfoje, vi vidos, ĝin subtenas aliaj membroj de la Okcidenta Teksto (§66), kaj kelkfoje ĝi strangas unuope.

§90 Lk6:5 D (kaj Mcion), sed neniu alia MSo de iu lingvo, metas 6:5 post 6:10; kaj anstataŭ 6:5 D sola diras:

En la sama tago vidante iun sabate laborantan li diris al li “Ho homo, se vi scias, kion vi faras, mi gratulas vin; sed, se vi ne scias, vi estas malbenito kaj spitano kontraŭ la Leĝo.”

Tio signifus: se la viro pro tio laboris sabate, ke li estas Kristano, bone; sed, se li estas ankoraŭ Judo, li defias la plej bonan religion, kiun li ĝis tiam renkontis. Nu ĝuste tian parolon Jesuo emis diri; kaj tute ne tian D fikcius por li; sed, se li ja diris ĝin, kial nur D raportas ĝin?

§91 Lk22:17-20: *it* kaj *sy* variigas la ordon de la versoj. Kaj D *it*<sup>codd</sup> (= *a*, *d*, *ff*<sup>2</sup>, kaj kvar aliaj) *sy*<sup>se</sup> (plejparte) *om* 22:19b,20 “kiu estas donita por vi... elverŝata por vi.” Jn, vi memoras, ne havas la inaŭguron de Sankta Komunio, kvankam li ŝajnas aludadi ĝin ĉie tra Jn6. Mk14:22-25//Mt26:26-29 kaj 1Korintanoj 11:23-25 donas al ni la disdonojn laŭ jena ordo: pano, kaliko. Lk22:16-20 donas: kaliko, pano, kaliko. Se la Okcidenta Teksto de Lk ĝustas malhavante verson kaj duonon, ni devas forstrecki la duan kalikon kune kun la ordono “Ĉi tion faru por memorigo pri mi”. Multaj nunaj eldonoj ĉi tie sekvas la Okcidentan Tekston kaj elĵetas 22:19b,20 en siajn margenojn. Ne decas, ke mi proponu konsilon al homoj tiom ol mi superaj; sed mi konjektos en ili du motivojn, kaj dubos pri unu el la du. Unu el iliaj motivoj (mi kuraĝas diri) estas, ke la suspektataj versoj tiel proksime similas la versojn en 1Kor11, ke ili entenas §55; kaj vere estas, ke, se vi petus min rediri la tekston laŭ Mk aŭ Mt, mi verŝajne emus ŝanĝi ĝin por taŭgi je 1Kor11, kiun mi aŭdas en la Diservo Komunio. Ilia motivo dua (mi suspektas) estas, ke ili miras vidante la kalikon rondiranta dufoje. Efektive tamen la kaliko en Juda Paskmanĝo rondiras kvar fojojn (mi donas la paĝnumerojn en la *Haggadah* eldonita de la Angla presejo Soncino): (1) post la komenca qidduŝ p.8; (2) post la lavo je ĉies manoj p.40; post tio rondiras la pano p.41; (3) antaŭ ol oni malfermas la pordon por Elija p.52; (4) fine de la niŝmat-himno (Mk14:26//Mt26:30) p.67. Povas esti eĉ, ke iu fruakopianto (kiu staras malantaŭ la Okcidenta Teksto ĉi tie) ne estante Judo miris vidante la kalikon du rondirojn havanta, ne sciante, ke ĝi verŝajne havis kvar; kaj pro tio, ke li neniam lernis pri §57, li glutis tiun varianton, kiun li povis kompreni.

§92 Lk24:51 kaj estis suprenportata en la ĉielon  $\aleph$  c A B C L  
W  $\theta$  fl f13  $\omega$ ) lat sy<sup>p</sup> Aug<sup>2/3</sup>  $\zeta$ ] om  $\aleph^*$  D a ff<sup>2</sup> sy<sup>s</sup> Aug<sup>1/3</sup>. Se D ĉi  
tie pravas, ĉi tiu evangelio havas nenian mencion pri la  
Ĉieliro, kvankam jes havas ĝin Ag de la sama verkinto.

§93 Ag12:10 post “kaj ili eliris” add “kaj malsupreniris la  
sep ŝtupojn” D kaj alia neniu ajn. Unu filologo sin deman-  
das, ĉu tio suferis difekton (§55) pro Jeĥezkel40:22,26; sed  
tio ne konvinkas. La ŝtupoj jam ne ekzistas, por ke ni nom-  
bru ilin; ĉu ili ekzistis, por ke S-ta Luko nombro ilin ĉirkaŭ  
la tempo de Ag23:16? Se jes, kial li neniun informis (se vi  
komprenas min) krom D ?

§94 Ag 19:9 (fino de verso) add de la kvina horo ĝis la deka  
D Vg<sup>codd</sup> sy<sup>cod</sup>. Tiranos verŝajne ĉesi instruadon ĉirkaŭ 11.  
00h. aŭ 12.00h. por sia tagmeza ripozo; kaj la lekciejo estus  
libera. Ĉu la de S-ta Paŭlo aŭdantoj tiom entuziasmis, ke  
(simile je turistoj kaj frenezaj hundoj) ili tagmeze ne ripoz-  
is? Aŭ ĉu D fikciis ĉi tion kaj §93 ?

§95 Ag15:20-29 21:25. Vi memoras, ke la Konsilantaro de  
Jerusalemo insistis pri nur tri (aŭ ĉu kvar?) reguloj por ne-  
Judoj dezirantaj bapton: ili detenu sin de

(i) objektoj oferitaj al idoloj,

(ii) malĉasteco, kaj

(iii) sufokitaĵoj kaj sango.

Ĉi tiujn tri regulojn (vi verŝajne jam scias) oni povas kom-  
preni aŭ (a) kiel Judajn tabuojn aŭ (b) kiel etikajn celojn por  
Kristano. Memoru: (i) neJudajn tagmanĝojn oni komencis  
oferante manĝeton al la hejmaj diaĵoj. Kaj (ii) multaj temploj  
idolismaj dungis aron da prostituitinoj por plinaskemigiankaŭ  
la grenon. Kaj (iii) la Judoj neniam manĝas viandsukon = sang-  
on): buĉante ili ĉerpas ĉiom de la sango antaŭ ol distranĉi la  
kadavron; la je tio malo estus, se iu mortigus ŝafon sufok-  
ante.

(a) Nu, se la tri reguloj estas tabuoj, ili signifas:

(i) ne manĝu en idolana hejmo,

(ii) ne eniru idolisman templon, kaj

(iii) ne manĝu viandsukon.

(b) Sed, se ili estas etikaj celoj, ili signifas:

- (i) ne kedu politeismon,
- (ii) ne uzu bordelon, kaj
- (iii) ne murdu.

Nu tio, kion mi tuj diros, ne estas egale vera pri ĉiuj la versoj Ag15:20,29 21:25; sed D *pc* sa Ir Tert Aug *om* “sufokitaĵoj” kaj *add* “kaj nenion faru al aliaj, kio ne plaĉus vin farate al vi”, kio estas la Ora Regulo (Lk6:31//Mt7:12) laŭ la vortoj de Tobit4:15, Hillel, kaj Rabeno Aqiba. Ĉu tio helpas vin elekti inter (a) kaj (b)? Aŭ ĉu la Okcidenta Teksto malpravas?

§96 Do ĉu ni povas fidi la Okcidentan Tekston? Kio igas ĝin malsama ol ĉiu alia? Kaj kial ĝiaj strangaĵoj tiom multas en Ag kaj la lastaj tri ĉapitroj de Lk? Iuj konjektis, ke eble dufoje S-ta Luko verkis Lk-Ag: unufoje, ni supozu, por sendi al Teofilo, kaj unufoje, eble, por la eklezio en Antioĥia. Se jes, nenio malhelpis, ke li subite memoru la nombron de la ŝtupoj (kiel ankaŭ D-ro Watson); aŭ kompreneble, ke li subite decidu, ke la nombro ne gravas kaj povas esti ne dirata; elektu laŭ, kiun eldonon via opinio li publikigis unue. Krom tio vi povus imagi, ke la du “libroj” (=rulaĵoj) de lia unua eldono estis kune konservotaj, kio signifus, ke neniom utilis mencio pri la Ĉieliro fine de vol. 1 (§92) kaj ankaŭ komence de vol.2 (Ag1:9); sed, se de la dua eldono la vol. 1 estus konservota en kolekto de kvar evangelioj, li eble decidus aldoni ĝiafine “kaj estis suprenportata en la ĉielon”, Sed ĉi tiu teorio pri du eldonoj frapiĝas sur du rokojn. (1) Kial D altaŭgigas la genealogion ĉe Lk3:23-31, ĝis ĝi (preskaŭ) akordas je la listo en Mt1:2-16? Kaj (2) kial la Okcidentaj atestantoj havas strangaĵojn (eble ne tiom strangajn) en libroj ne de S-ta Luko? Jen unu.

§97 Mk1:41 kortuŝite *rell* ĉ] kolerigite D *aff*<sup>2</sup>. Oni povus en ĉi tio trovi sencon: la konkludon, kiun Jesuo deziris nin lerni el liaj mirakloj, estis ne lia potenco, sed lia karaktero; kaj en verso 40 la homo dubis, ĉu Jesuo helpi volas. Tatianus (Romo ĉ.160) skribas:-

Pro tio, ke li diris “Se vi volas”, li koleris;  
pro tio, ke li aldonis “vi povas”, li sanigis lin.

Ĉu la legaĵo de D venkas laŭ §57?

### Via Plua Progreso

- §98 Povas esti, ke mi jam tiom kondukis vin, kiom vi deziras iri (aŭ ĉu pli?), kaj ke vi nun deziras forlasinte ĉi tiun studon reiri al via Biblia klaso, abiturientado, pastriga ekzameno, aŭ simila. Eĉ se jes, mi konsilus, ke vi legu la libron de Bruce en §100.
- §99 Se vi deziras pluen iri (pastrigonte, aŭ iom da Greka studinte, aŭ al aliaj prirespondante pri fidindaj informoj), saĝe estusrelegi unue ĉi tiun artikolon. Renkontante legaĵojn debatajn ekzercu vin rimarkemiĝi; kaj penu lerni ankaŭ, kiuj atestantoj emas kune voĉdoni, kaj, kiujn virtojn ili havas, kaj kiujn malfortojn. La 37 ekzemploj en ĉi tiu artikolo ne estos sufiĉaj; do akiru Grekan N.Ton (§114). Kaj vi verŝajne decidus akiri aŭ pruntricevi unu-du el jenaj libroj: tiuj en §§100-107 ne postulas ĉi vi iun lingvon krom la Anglan; tiuj en §§108-113 citas pecetojn Greke.
- §100 **F.F. Bruce:** *The Books and the Parchments* = La Libro kaj la Pergamenoj (Pickering, tria eldono 1963, 25 ŝilingoj). Nur unu ĉapitron li havas pri la N.Ta teksto: ceteraj temas pri ekzemple la Malnov-Testamenta, la lingvo Hebrea, la *Apocrypha*, la arto Angliĝi, kaj eĉ la historio de la alfabeto.
- §101 **Frederic Kenyon:** *Our Bible and Ancient Manuscripts* = Nia Biblio kaj Antikvaj MSoj (Eyre, nova eldono reviziita de Adams 1958, 42 ŝilingoj). Ĉi tio traktas ambaŭ Testamentojn per kvanto da eruditeco, kaj havas bonegajn bildojn. Kenyon estis kuratoro de la Brita Muzeo.
- §102 **H.G.G. Herklots:** *Back to the Bible* = Ni Reiru al la Biblio (Benn, 1954). Traktas ambaŭ Testamentojn.
- §103 **Peake's Commentary** (Nelson, tuttute reverkita 1962, 70 ŝilingoj). Havas artikolon de Clark sur pp.663-670: *Textual Criticism of the N.T.*
- §104 **Hastings Dictionary of the Bible** (Clark, reviziita eldono 1963, 100 ŝilingoj) havas longan artikolon sur pp.979-994.
- §105 **A New Commentary on Holy Scripture** redaktita de Gore.

- Guillaume, kaj Goudge (S.P.C.K. = *Society for Promoting Christian Knowledge*, 1928) havas interesan artikolon de C. H. Turner sur pp.718-729 de siaj N.Taj paĝoj.
- §106 **Lowther Clarke**: *Concise Bible Commentary* (S.P.C.K., 1952, 30 ŝilingoj) havas mallongan artikolon pp.267-278.
- §107 **Manson**: *Companion to the Bible* (Clark, reverkita eldono 1963, 35 ŝilingoj) havas artikolon de Nigel Turner sur pp. 163-182 al tiuj adresatan, kiuj jam scias multon pri tio kaj deziras ĝisdatiĝi pri freŝaj pendol-iroj de opinio.  
Jen kelkaj Grekajn vortgrupojn citantaj:-
- §108 **B.M.Metzser**: *The Text of the New Testament* (Oxford, 1964, 42 ŝilingoj en Britujo). Li estas profesoro en la universitato de Princeton en Usono; kaj lia libro estas (almenaŭ nun) la plej aŭtoritata. Vidu §63.
- §109 **Vincent Taylor**: *The Text of the New Testament* (Macmillan, 1961, 15 ŝilingoj).
- §110 **Frederic Kenyon** (§101): *The Text of the Greek Bible* (Duckworth, nova eldono 1949, 9 1/2 ŝilingoj) havas ankaŭ unu ĉapitron pri la LXX (§50).
- §111 **Alexander Souter**: *Text and Canon of the New Testament* (Duckworth, reviziita de C.S.Williams 1954, 9<sup>x</sup>/2 ŝilingoj). La vorto “kanono” signifas (ĉi tie): kiuj libroj estu en la Biblio, kaj kiuj elĵetiĝu. Vidu §118.
- §112 **Kirsopp Lake**: *The Text of the New Testament* (Rivingtons, sesa eldono sen dato sed evidente antaŭ 1933, 4 ŝilingoj). Ĉi tiu estas la viro de §34.
- §113 **Leo Vaganay**: *Initiation a la critique textuelle neotestamentaire* (Parizo, 1934) malbone Angligita kiel *An Introduction to the Textual Criticism of the new Testament* (Sands, 1937, 5 ŝilingoj) plena je preseraroj.

### Grekaj Testamentoj

- §114 Jen iom da konsilado por aĉeti Grekan N.Ton. Unue: ĉiu antaŭ 1900 presita kaj neĉi tie listita verŝajne estas *Textus Receptus* kaj ne fidinda; se vi dubas, unu rimedo provi estas vin turni al Un5:7 (§14.) Se vi ne deziras jenon

tralegi, vi povas nur mendi la viatempan eldonon (= ne antaŭ 1958) el la B.F.B S. (§122); ĝin mi plej rekomendas.

§115 **Tischendorf** (§28) en 1869 publikigis sian okan eldonon, kiu havas pli ampleksan aparatus criticus, ol ĉiu alia (krom Legg, kiu neniam liveris plu ol Mk kaj Mt); sed vi ne rajtas postuli, ke Tischendorf registru MSojn post li trovitajn. Vi akiros ĝin nur brokante; kaj mi tre gratulas min, ke mi ekzempleron posedas.

§116 **Westcott** kaj **Hort** en 1881 publikigis sian *The New Testament in the Original Greek* (= La N.To laŭ la Origina Greka), genian verkon, pri kiu oni nune kritikis nur la lastajn kvar vortojn de ilia titolo: t.e., ili rekondukis nin, ne en la originajn tekstojn de la aŭtoroj verkitajn, sed tre sukcese ĝis la plej eruditaj Kristanoj en Aleksandrio je frua dato (§64). Westcott estis episkopo de Durham; kaj Hort lekciadis en Cambridge. Per ilia eldono oni instruis min dum mia gimnazia aĝo. Nenian aparatus criticus ili donas; sed Hort publikigis duan volumon, en kiu li longe diskutis multajn el la plej gravaj lokoj, kune kun teda sed sagaca traktato pri la scienco tekstkritika (§58).

§117 **Nestle** el Stuttgart, kaj poste lia filo, publikigis serion da bonaj eldonoj eke de 1898 ĝis—nu la mia estas ilia dudekunua eldono (1952); sed baldaŭ aperos dudek-kvina. Pro tio li redaktis sian unuan, ke li tiom indignis, kiele la B.F. B.S. (§122) daŭrigis (antaŭ 1904) represi la Textus Receptus. Li presas sian antaŭparolon kvarlingve; do, se vi ne facile komprenas Germane, vi povas legi ĝin Latine, Angle, aŭ Svede. Li liveras ankaŭ eldonojn kun la Vulgato kontraŭpaĝe. Liajn sigla vi eble trovos iom malfacilaj por kutimiĝi.

§118 **Souter** (§111) en 1910 (plibonigita eldono 1947) publikigis en Oxford tekston, kiun li igis precize la teksto malantaŭ la Angla traduko de 1881 eĉ pri interpunkcio; do el tio mi ofte instruas, se miaj knaboj havas tiun Anglilon. Lia aparatus criticus estas ne granda, sed fortas pri la Patroj.

§119 **Merk**. Nun mi donos tri Romkatolikajn; do ne diru, ke tiuj ne studas la Bibliion. La plej bona estas Augustin



Merk S.J. (= Jezuito). Lia oka eldono (Romo 1957) pluiras, ol liaj antaŭaj: ĝi sukcesas paki multan informon en sian aparaton ordigante la atestantojn ne laŭ ia ordinara ordo (kiun ankaŭ mi uzis por vi) sed kune metante reciproke akordemajn. Ĉi tiun eldonon mi uzas korespondante inter-nacilingve kun Nederlanda Jezuito erudita; sed mi ĵus aŭdis, ke oni jam publikigis pluan.

§120 **Bover** (plua Jezuito): kvara eldono, Madrido 1959. Lia aparato registras malmultajn MSojn, sed aldonas, kiuj redaktantoj voĉdonis ĉiudirekte el listo de ses, inter kiuj Tischendorf, Westcott-kaj-Hort, von Soden (§26), kaj Vogels.

§121 **Vogels**: kvara eldono de vol.2, Barcelona 1955. Oni nun revizias vol.1 (= evangelioj kaj Ag); sed mi ĵus aŭdis, ke oni ne esperas ĝin eldoni baldaŭ. Ĉiuj tri N.Toj §§119-121 presas sur siaj kontraŭaj paĝoj la Latinan vg<sup>cl</sup> (§36). Merk kaj Bover nomas la Mson Sinaiticus “S” anstataŭ “κ” (§28 a).

§122 **Kilpatrick**. Antaŭ 1904 la B.F.B.S. (*British and Foreign Bible Society* = la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, kiu eldonas la Bibliion en centoj da lingvoj) nur daŭrigis presi la Textus Receptus. En 1904 ili komencis presi la kvaran eldonon de Nestle sed kun preskaŭ nenia aparato. En 1958 Kilpatrick redaktis por ili la eidonon, kiun mi plej rekomendas: plej malalte kosta bindo 8 1/2 ŝilingoj; ĝia antaŭparolo estas Angla. Nun li laboras pri plua eldono, kies kelkajn partojn la B.F.B.S. jam nepublike presis; sed oni ankoraŭ ne planas publikigi ĝin tuj.

§123 Bengel (§57) skribis Latine en sia antaŭparolo:  
Vian menson fokusigu sur la tekston;  
ĝian instruon fokusigu sur vin.

## Mallongigoj

MSo = manuskripto.

N.To = la Nova Testamento.

La unuajn kvin librojn de la N.to = Mt, Mk, Lk, Jn, Ag.

1 Jn5:7s = la Unua Epistolo de S-ta Johano, ĉapitro 5, verso 7  
kaj la sekvanta verso.